



Heroldo

97 jaroj

Fondita en 1920

de Esperanto Ni pripensas la mondon

ISSN 0018-0823

www.heroldodeesperanto.com

N-ro 6 (2273) — 93-a Jarkolekto

Fondita de Teo Jung en Kolonjo (Germanio)

Eldonata en Trindado - GO (Brazilo)

€5,00
R\$16,00

spegulo

Barok-Projekto

En Brazilo estis fondita metalroka E-bando, fare de profesiaj muzikistoj, kiuj celas la neesperantan merkaton. **p. 3**



La novaĵoj de Heroldo por 2018

Konciza artikoleto prezentas la novaĵojn de Heroldo por la jaro 2018, kun mallonga komento rilate al la disputo kun LF-koop pri la posedo de Heroldo. Aliflanke, la lanĉo de la 6-a numero de la jarkolekto 2017 kaj la tuja veno de la 1-a de 2018 estas bona aŭguro por la nova Heroldo, eldonata nun en Brazilo. **p. 7**



Vivu la krizo de la Esperanto-movado

Oni multe parolas pri la UEA-krizo, sed fakto estas ke la tuta E-movado krizas, dum Esperanto mem bone fartas kaj viglas. Heroldo pritraktas la temon el nova vidpunkto kaj invitas la E-pensularon partopreni grupon kies celo estos redakti principaron kiu anstataŭu tiun de Frostavallen, ĝis la UK en Lisbono. Kaj vivu la krizo! **p. 5**

La mondo kaj ankaŭ ILEI moviĝas

Mireille Grosjean, la prezidanto de ILEI, per sia artikolo "ILEI en la nuntempa moviĝanta mondo" asertas, ke krizo estas tikla momento, kie la movoj estas pli fortaj... Kaj ŝi montras la movojn de ILEI sur pluraj laborkampoj. **p. 6**

La ĉina ekonomio

Aldreno Speck, brazila esperantisto kiu loĝas en Ĉinio kaj laboras sur la kampo de internacia komerco, prezentas kelkajn aspektojn de la ĉina ekonomio. **p. 6**



La Esperanta libromerkato

La E-libromerkato estas la temo de la ĉi-numera ĉefartikolo, kun komentoj pri la artikolo de Paweł Fischer-Kotowski en Libera Folio. **p. 2**

INFORME

- Ĉi tiu numero de Heroldo havas nur 12 paĝojn, sed kompanse la UK-numero en septembro 2018 havos 20 paĝojn.
- Dum la eŭropa somero, tri numeroj de Heroldo estos presataj en Italio.

ĈEFARTIKOLO

Endas survojiĝi al profesia E-libroeldonado

Libera Folio aperigis artikolon (<http://bit.ly/libroj-2017>) de Paweł Fischer-Kotowski, per kiu la aŭtoro brile prezentis trarigardon pri la plej atentindaj verkoj eldonitaj dum la pasinta jaro. Por tiuj, kiuj ŝatas regule legi en Esperanto, la artikolo estas ja ĝuinda, ĉar per bona stilo kaj interesaj komentoj oni prezentas diversajn aspektojn de la Esperanta eldonado tra 2017.

Tamem la koncerna analizo konsistas el subjektivaj vidpunktoj. Tute klare, la celo ne estis pritrakti la agadon de nia "libroindustrio" laŭ la vidpunkto de la merkato kaj de la profesia editorado kaj eldonado, kvankam el la artikolo mi plukis spurojn kiuj kondukas nin al la komerca analizado de nia libromarkato. Kaj tial mi komplementos la artikolon, lige al la ĉefreportaĵo en tiu ĉi numero de Heroldo, pri la krizo kiu hantas la E-asociaron. Ni komencu per prezento de panoramo pri nia agado sur la kampo de eldonado, el la ekonomia kaj merkata vidpunktoj.

ESPERANTUJO BEZONAS SIAN LIBROINDUSTRION

Eldoni libron en Esperantujo estis dum longa tempo ĉefe laboro de entuziasmaj amatoroj. Jes, jam en la tempo de Zamenhof, granda eldonejo - Hachette - enplektiĝis en nian aferon, sed la partneriĝo ne longe daŭris, eble pro tio, ke Hachette ne multon vendis tra la tuta mondo, spite al la eventualaj priaj esperoj de la eldonistoj.

Fakte la esperantistoj mem, sen fakaj konoj pri editorado, dezajno kaj aliaj gravaj aspektoj ne preterlaseblaj de profesiaj eldonistoj, prenis sur sin la taskon eldoni librojn. Foje aperis talentaj amatoraj eldonistoj, kiuj sukcesis eldoni sufiĉe bonajn librojn. Eĉ nuntempe, granda parto de niaj eldonejoj, kun maloftegaj esceptoj, ŝajnas ne scii kiel profesinivela lanĉi siajn varojn. Tre malbone planitaj kaj malbelaj kovriloj, foje fuŝa kompostado ktp estas oftaj misfaroj de multaj el niaj eldonejoj.

Tia situacio, kompreneble, estas rezulto de la ĝisnuna karaktero de Esperanto, alidire afero de preskaŭ nur pli-malpli entuziasmaj esperantistoj, kiuj plejparte ne akceptas - pro malĝusta kompreno pri la esenco kaj la trajtoj de la E-agado aŭ pro antaŭjuĝemo kaj dogmismo konduko - ke la ekspansio de Esperanto tra la mondo povas pli grandskale okazi per la laboro de profesiaj movadanoj.

Do indas, parolante pri libroeldonado en Esperantujo, dum la tradiciaj movadaj asocioj krizas, pensi pri la E-libro kiel valora enspezo-fonto. La libroservo de UEA, ekzemple, ĉesu esti nura librovendejo, kien iras tiuj kiuj scias ke ĝi ekzistas, por komenci agadi kiel entrepreno. Kontraŭe

la UEA-krizo pliakriĝos, kiam nia libromarkato fariĝos interesa por profesiaj librovendistoj, kiuj multe pli kompetente ol UEA sin dediĉos al "aktiva vendado de E-libroj" anstataŭ atendi, sidante, la venon de mendoj.

Eblas kvaroblighi la skalon de la E-libromarkato per nur profesia aliro de eldonejoj kaj librovendejoj kaj la engaĝiĝo de ĉiuj ceteraj agantoj: verkistoj, tradukistoj, aŭtoroj de lernolibroj, E-instruistoj kaj periodaĵoj.

KOMERCAJ KOMENTOJ PRI "LA LIBROJ DE LA JARO 2017"

Nu, ni kaptu la okazon por komenti kelkajn vortojn el la artikolo de Paweł Fischer-Kotowski, sed el la merkata vidpunkto.

"La jaro 2017 estis avara je novaj Esperanto-libroj. En la lastaj 12 monatoj sur la bretoj de la Libroservo de UEA aperis nur iom pli ol 150 novaj varoj, plejparte libroj. Ne temas nur pri libroj esperantlingvaj. Tiuj, kiuj ne estas en Esperanto, estas tradukoj el Esperanto aŭ ili temas pri la lingvo kaj movado."

Nu, 150 novaj varoj en nia plej granda libroservo montras la faktan liliplutecon de la E-libromarkato. La mencio pri tradukoj el Esperanto montras trairindan vojon, ĉar en Esperanto ne mankas libroj, kiuj eldonindas en naciaj lingvoj. Tio povus, ekzemple, fariĝi bazo por ke UEA povu superi sian krizon, se, anstataŭ klopodi konkretigi tro da celoj bezonantaj la enplekton de pluraj ĉefmotoraj asocioj, ĝi fariĝus la ĉefmotoro de nia libroindustrio. Per bona sistemo de partneriĝo kaj kun NRO-j kaj libro distribuantoj en ĉiuj landoj, UEA povus simple fariĝi grava kaj potenca eldonejo kaj libropropagandisto. Parton de la profito ĝi uzus por flegi siajn nekomercajn projektojn. Aliĝkotozaj fariĝus ne la plej granda parto de la enspezo, sed eta financado flanke de la esperantistoj, kio ebligus al UEA riski eldoni fakajn librojn, dum la merkato ne estas granda por tiaj libroj... Certe iam aperos grandaj eldonejoj sur la scenejo.

"Vortaroj kaj terminaroj"... lern- kaj legolibroj

Kelkaj vortaroj kaj terminaroj estas cititaj kaj ni aldonus al ili, kiel interesan agadkamon por profesiaj eldonejoj, la publikigon de lernolibroj kaj legolibroj por komercantoj, similaj al tiuj tre konataj kaj ŝatataj serioj de legaĵoj en la angla lingvo por komercantoj.

Anstataŭ improvize agadi por diskonigado de Esperanto, ĉiuj bone strukturitaj E-asocioj fariĝu la ĉefaj protagonistoj de profesinivela E-libromarkato.

Ĉu krizo? Ne, dankon!

EŬROPCENTRISMO - PRIMOVADA VIDPUNKTO

Eŭropo, umbiliko de Esperantujo

Fabricao Valle

Ne temas pri akuzo, nek pri kritiko. Aserti, ke Eŭropo estas la umbiliko de Esperantujo, alidire, ke nia movado estas eŭropcentrismo, ne estas ofendo, sed simpla konstato. Jes ja, eble Esperanto ne estas eŭropcentrismo, tamen mi ne parolas pri la lingvo, sed pri la aro da homoj kaj asocioj, kiuj agadas por difinitaj celoj ligitaj al subteno de la lingvo tra la tuta mondo. Ĝi estas ja eŭropcentrismo, kaj pri tio kulpas neniu. Fakte estas, ke nia movado ankoraŭ prenas Eŭropon kiel referencon, sed tion ni devas ŝanĝi, se ni volas, ke Esperanto fariĝu lingvo vere internacia.

Sed kio estas "eŭropcentrismo"? Laŭ Vikipedio:

"La termino Eŭropcentrismo (kaj ankaŭ eŭrocentrismo kiel neologismo per asimilo al aliaj lingvoj) aplikigas al ĉiu ajn tipo de agado, sinteno aŭ intelekta tendenco, ĉu historiografia aŭ pri socia evoluo, kiu konsideras, ke Eŭropo kaj ties kulturo estas aŭ estis la centro kaj motoro de la civilizo, kaj ke pro tio oni identigas la eŭropan historion kun la Historio de la mondo. La eŭropcentrismo estas unu el la diversaj formoj de etnocentrismo".

Estas interese, ke, kiam Adam Smith verkis en sia libro La riĉeco de la nacioj, ke "Ĉinio estas dormanta nacio", la komerco de tiu orienta lando estis multe pli granda kaj grava ol tiu de Eŭropo. Tamen, el la relative mallonga hegemonia periodo de Eŭropo (ĝis la komenco de la 19-a jarcento) restas la ideo, ke ĉio venanta el Eŭropo havas klerisman karakteron kaj superas ĉion neeŭropan, ĉu intelekte, ĉu kulture, ekonomie kaj politike.

Nu, nia lingvo naskiĝis en Eŭropo, faris la unuajn paŝojn en la malnova kontinento, elstariĝis kiel viva lingvo per la laboro de la eŭropanoj; preskaŭ ĉiuj niaj grandaj verkistoj kaj historiaj korifeoj estas eŭropanoj.

UEA, TEJO kaj SAT, kiuj ĝis hodiaŭ ludis solaj la rolon de grandaj E-organizaĵoj, estas eŭropaj NRO-j; la fakto ke ili ricevas aliĝkotozajn el pluraj landoj ne sufiĉas por ke ili nomu sin "internaciaj organizaĵoj". Ankaŭ ilia pensmaniero devas fariĝi internacia.

La strukturo de nia novado konservas sian centron en Eŭropo. Ekzemple, rilate Afrikon, oni diras, ke la E-afrikanoj vigle partoprenas la E-movadon, sed ĉu ili rajtas elekti kiel kaj kion fari? Kion diri pri konfliktoj inter UEA kaj Gbeglo Koffi kaj ties grupo? Ĉu la opinio de unu el la plej laboremaj kaj brilaj afrikaj esperantistoj valoras neniom? Oni diras, ke estas neeble dialogi kun li. Ĉu vere oni volas dialogi... aŭ monologi? Ĉi-okaze, agi neeŭrocentrisme estus akcepti, ke afrikanoj povas havi sian pens- kaj labormanieron kaj lasi ilin konstrui sian movadon aŭtonome. La solidaraj ligoj interkontinentaj nepre ekzistu, sed surbaze de respekto.

Cetere, se la esperantistoj ekstereŭropaj ne havus nur la eŭropajn instituciojn kiel centrajn, ili povus labori multe pli efike en sia regiono.

Aliaspekte, jam temp' estis por ke la samideanoj el la tuta mondo komencu sin demandi "kio estas por mi Esperanto?". Dum la mondo brulas, malsato disvastiĝas, landoj elfalas, senlaboreco kreskas kaj la riĉaĵoj de la mondo koncentriĝas en la manoj de tro malmultaj homoj kaj landoj, plej ofte la esperantistoj prenas Esperanton kiel nur hobion, lingvon por simpla amikiĝo. Ĉu vere la esperantistoj en Afriko, en Azio, en Latinameriko

ktp volas fakte nur interpersonan amikiĝon per Esperanto? Se jes, tio estas rezulto de la influo de nia eŭropa kaj pionira periodo, kiam la prioritato estis maturigi Esperanton kiel lingvon, ne utiligi ĝin kiel socialan interlingvon por praktikaj celoj, sen rezigno pri la interna ideo.

Jen ni venas al turnopunkto: Esperanto povas roli kiel lingvo por malkoloniigi la pensmanieron de ĉiuj esperantistoj. Se ni ĉiuj do ankaŭ la eŭropaj esperantistoj komprenos, ke Esperanto povas ludi rolon en la batalado kontraŭ la maljusteco, la akaparado de la riĉaĵoj de la malfortaj landoj fare de grandaj potencoj kun la helpo de multnaciaj entreprenoj, se ni prenos serioze la idearon de Zamenhof, ni ĉiuj kune povos konstrui novan civilizacion. Jes, konstrui novan civilizacion ne estas afero por hobiuloj, sed demando al malsata homo, al orfo, al elmigrintoj pro konfliktoj, ĉu interesas ilin lerni Esperanton kiel hobion?

Zamenhof ne kreis Esperanton por ke ĝi estu parolata nur inter bonfartaj homoj. Pro sia facileco, ĝi povas esti amase instruata al margenuloj tra la tuta mondo. Esperanto de nur elita grupo ja estas konsekvenco de la unua fazo de ĝia historio, dum kiu la celo estis fari el la zamenhofa lingvoprojekto vivan lingvon. Oni sukcesis, sed nun la tradiciajn E-movadajn taskojn oni povas plenumi tute sendepende. Gejunuloj eklernas Esperanton hodiaŭ, kaj morgaŭ oni povas ekbabilu per Skajpo. Libron oni povas aĉeti per la reto. Eblas kunsidi rete. La tradicia misio de la E-asocioj nur diskonigi kaj instrui Esperanton estas tipa afero de la eŭropa fazo de Esperanto, de la fazo kiam Eŭropo estis la umbiliko de Esperantujo.

En la nova fazo de la historio de Esperanto, plej gravas uzi ĝin por transformi la mondon, plibonigi ĝin, ne per vortoj kaj promesoj pri idealigita internacia lingvo, kies parolantoj hezitas adopti ĝin por praktikaj aferoj (sen rezigno pri ĝia interna ideo). La plej stulta dogmo en la nuntempa Esperantujo labori profesie por Esperanto ne estas akceptebla estas afero radikale ligita al tiu unua fazo de Esperanto, tute eŭropeca.

Per la tutmondiĝo kaj la uzo de nia internacia lingvo ni nun transsaltas al nova epoko, dum kiu plu estos hobiuloj; sed, pro la fakto, ke la mondo bezonas Esperanton tuj, ne morgaŭ aŭ en ajna estonteco, ĝi nepre estos afero ĉefe de bone strukturitaj socialcelaj asocioj, kun profesia bazo, afero de profesiuloj plentempe laborantaj por kaj per Esperanto kontraŭ salajro.

La hobiuloj povos plu ludi per sia lingva hobia. Ankaŭ ili gravas, ĉar ili povos iel kontribui al la evoluo de nova strategio: la E-agado ne plu estu montri Esperanton en vitrino al la mondo, sed efektive labori, tute sen lingvaj baroj, por plibonigi la mondon.

En la komenciĝanta nova fazo de Esperanto, la eŭropaj esperantistoj lernu pli funde pri siaj samideanoj ekster Eŭropo, dum la ekstereŭropaj esperantistoj siavice devas lerni kiel aŭtonome labori per kaj por Esperanto. La internacia interŝanĝo inter ĉiuj okazu en la sama nivelo, ne kiel helpantoj/helpatoj aŭ gvidantoj/gvidatoj. Ĉiuj esperantistoj devas lerni kiel pensas kaj vivas la samideanoj de aliaj landoj.

Starigi kulturajn kaj ekonomiajn rilatojn, dum oni individue kaj institucie amikiĝas je horizontala nivelo, estu grava trajto de la tutmonda fazo de Esperanto.



Ni pripensas la mondon

Redakcia stabo

Redakcia Direktoro -
Fabrício Valle

Vic-Redakcia Direktoro -
Bruĉjo Kasini

Redaktoro - vakas

Kun-redaktoro -
Vakas

Redakcia sekretario -
Andrej Peĉenkin

Ĉefproleganto -
Roberto Pigro

Kolumnistoj

Internacia Laborlingvo (El la redakcio) - Scienca Heroldo (diversaj kunlaborantoj) - Jes Ja! (César Domeles) - Per/Por Esperanto (Renato Corsetti) - Memorindaj esperantistoj (Xavi Alcalde) - Tra Esperantujo (El la redakcio)

Ĉi-numeraj kunlaborantoj

Rubén Fernández Asensio - Aldreno Speck -
Meirelle Grosjean - Andrej Peĉenkin

Fondinto

Teo Jung (1892 - 1986)
https://eo.wikipedia.org/wiki/Teodor_Jung

Grafikisto

Eric Kaji

Reta versio
www.heroldodeesperanto.club

Reta abonilo
www.heroldodeesperanto.com

Retadresoj

Redakcio
redakcio@heroldodeesperanto.com

Demandoj pri abono
abono@heroldodeesperanto.com

Ŝtata demagogio kaj la “kataluna demando”

Rubén Fernández Asensio

En mia unua artikolo mi karakterizis esperantismom kiel pozitivan sekvon de naciismo. Nun mi devas turni la atenton al ĝiaj negativaj efikoj.

Ĉirkaŭ la jaro 1958, mia avo decidis forlasi sian vilaĝon en Murcio (suda Hispanio) kaj migri Katalunio. Li tion anoncis al la bienmastrino, kiu posedis la tutan vilaĝon kaj ekspluatis la senterajn kamparanojn ricevante duonon de ĉiu rikolto. Laŭ mia patro, tiam 10-jaraĝa, ilia konversacio estis jena:

“Ne iru: ĉu vi ne scias, ke la katalunoj estas kiel judoj?”

“Povas esti. Nek judojn nek katalunojn mi konas. Sed mi ja konas vin!”

Tiu ĉi signifoplena ekzemplo liveras senegalan enrigardon en la nacian hispanan psikologion kaj en la rolon de la katalunoj en ĝi. En 1492, tuj post la unuiĝo de la reĝlandoj Kastilio kaj Aragono kiu naskis Hispanion, ne nur la lasta islama regno en la iberia duoninsulo estis konkerita, sed ankaŭ estis forpelitaj la judoj. Tiu forpelo apartigas la hispanan kulturon disde tiu de la plimultaj eŭropaj nacioj: malaperis ne nur la ekstera malamiko, sed ankaŭ la interna Aliulo, kies religio difinis la limojn de la Nio. Ĝin anstataŭis la katalunoj. Ekde tiam intermitadas en Hispanio periodaj febroy de katalunmalamo, kiel videblas, ekzemple, en famaj poemoj de la verkisto Francisco de Quevedo.

Jam en 1908, dum burĝonadis kontraŭsemidismo en Eŭropo, la populisto Lerroux fondis la unuan kontraŭkatalunan partion. En anomalie senjuda Hispanio, la katalunoj jam plenumis la rolon de interna malamiko por ambiciaj demagogoj. Post la ekstermo de la judoj, kiam naciisma demagogio reaperis en Eŭropo, la enmigrintoj, precipe la islamaj, fariĝis la celata interna abomenulo, krom en Hispanio. Ĉie en Eŭropo ekfloris ekstremdekstraj fremdulmalamaj partioj, krom en Hispanio. En Hispanio, la sola nova partio sukcese konkuranta kun la tradicie dekstra Popola Partio estas Ciudadanos, sociale dekstra, fremdul-indiferenta kaj furioze kontraŭkataluna, ĉar fondita de hispanoj en Katalunio en 2006. Ĉar la “kataluna problemo” neniam estis vere solvita, senskrupulaj politikistoj povas daŭre eluzi ĝin por eksciti la malklerajn amasojn kaj devojigi ilian koleron disde bienistoj, bankieroj kaj grandkapitalistoj.

Kompare al kontraŭsemidismo aŭ frem-



Pli ol unu miliono da homoj kunvenis en Barcelono, Hispanio, por partopreni manifestacion postulantantan sendependecon por Katalunio, la 11-an de septembro 2012

dulmalamo, katalunmalamo havas avantaĝojn: internacie, ĝi ŝajnas respektinda ĉar nekomprenata, kaj kaŝas sian naciismon atribuante ĝin al sia viktimo; enlande, anstataŭ devigi elpensi novajn fantomojn, ĝi ekspluatas tre antikvan kaj potencon malsimpation. La hispanaj stereotipoj pri la katalunoj surprize similas tiujn pri la judoj: senhumuraj monavidaj burĝoj ekspluatantaj laboristojn, malsolidaraj patruj-perfidantoj, la enkarniĝo de kapitalismo mem. Se vin ŝokis la nekomprenbla rabio de la hispanaj policanoj atakantaj senhelpajn voĉdonantojn dum la referendumo de la 1-a de oktobro, sciui kion vi fakte vidis: pogromon, rekte organizatan de la hispana registaro.

La nuntempa ondo de hispana naciisma demagogio komenciĝis ĉirkaŭ la jaro 2005, kiam pluraj aŭtonomaj registaroj decidis ĝisdatigi siajn “statutojn” aŭ bazajn konstituciajn leĝojn. Tiam la publika deziro pri sendependeco en Katalunio staris je 13%, kaj neniu partio en la kataluna parlamento malférme favoris ĝin. Ĉar statuto estas organa leĝo, la projekton aprobitan de regiona parlamento devas aprobi ankaŭ la hispanaj Kortesoj antaŭ ol ĝin sankcios la popolo de la regiono per referendumo. La novaj statutoj de Valencilando, Aragono kaj Balearoj estis senprobleme aprobitaj, sed la katalunan la Kortesoj tiel profunde “rabotis”, laŭ grafika esprimo de la kontraŭkataluna socialisto Alfonso Guerra, ke la katalunoj seniluziĝis kaj, en la referendumo, 51% sin detenis kaj nur 35% ĝin aprobis. Tamen la “rabotado” ne sufiĉis por la Popola Partio (PP) de Mariano Rajoy,

kies tradicia kontraŭkatalunismo pliakriĝis por konkuri kun tiu de Ciudadanos. En la opozicio, la PP komencis sisteme ekspluati katalunmalamon por agiti la amasojn kaj rivali kun la reganta Socialisma Partio. Ne kontenta pri sia partopreno en la kortesa “rabotado”, Rajoy kolektis kvar milionojn da subskriboj tra Hispanio por postuli tut-hispanan referendumon de la kataluna Statuto. Krome, tuj post la sankcia referendumo en Katalunio, la PP apelaciis al la Konstitucia Kortumo kontraŭ 127 el ĝiaj 246 artikoloj. La duoblan mezurilon de la hispanoj bone montris la Statuto de Andaluzio, kiun la Kortesoj aprobis en 2007, kvankam ĝi estis kopio de la kataluna: 74 el ĝiaj artikoloj estis egalaj al tiuj apelaciitaj en la kataluna, 39 laŭvorte.

Baldaŭ montriĝis, ke naciisma demagogio povas mobilizi ne nur la popolaĉon, sed ankaŭ klerajn funkciulojn kaj juĝistojn. Hispanio neniam alte rangis pri juĝista sendependeco; la plej altajn juĝistajn postenojn nomumas la du ĉefaj partioj, la PP kaj la socialistoj, aparte tiujn en la Konstitucia Kortumo, kiujn la partioj nomumas por nur 9 jaroj kaj kiuj sekve apartenas fakte al iliaj fidelaj dungitoj. La PP sukcese manovris por nomumi eĉ kotizantajn membrojn al tiaj postenoj. Ju pli da leĝoj aprobitaj de la kataluna parlamento forstrekiis tiu kortumo, des pli da katalunoj komencis rigardi sin “kolonio” rekte regata de Madrido. En 2010 fine la Kortumo verdiktis pri la Statuto. Ĝis tiam, la Kortumo povis nur forstreki vortojn de leĝoj kiel nekonstituciajn, sed tiu verdikto signis turnopunkton, ĉar la Kortumo permesis al si

ne nur forstreki sed ankaŭ revertumi 41 artikolojn, inkluzive multajn troveblajn laŭvorte en aliaj aŭtonomaj statutoj. Subite la kabineto de la PP, konsistanta en 12 dungitoj, diktis leĝojn al la tuta kataluna popolo, preter la decidoj de elektitaj reprezentantoj kaj de la popolo mem en referendumo. Pli kaj pli da katalunoj taksis tion ŝtatrenverso kaj, kiel Herzl kaj la cionistoj, konvinkigis ke nur en propra ŝtato ili havos rajton je memregado. Tiam la suverenisma movado eksplodis.

Ankaŭ tiam la Socialisma Partio draste senkreditigis pro la granda ekonomia krizo, samtempe paralizite de la demagogaj admonoj de la PP ne cedi al la katalunaj “perfiduloj”. En la fru-balotoj de 2011, la PP rikoltis la frukton de sia populisma agitado kaj amase venkis: neniam antaŭe unu partio regis la Kortesojn per absoluta plimulto. Unuafoje en la historio de la hispana “demokratio”, la reganta partio ne devis kompromisi kun la ĉefa partio en Katalunio aŭ en Eŭskio; tiel malaperis la lasta bremsado de hispana naciismo. Samtempe, tamen, la neniam ĉesanta flueto da skandaloj pro korupteco de la PP je ĉiuj niveloj kreskis ĝis ĝi fariĝis lavango. Baldaŭ evidentiĝis ke akceptado kaj disdonado de subaĉetoj estas tiel kutima, ke ĝi konsistigas duan sekretan librotrenadon de la PP kaj ke Rajoy mem ricevas tian kromsalajron. En la amaskomunikiloj, la PP devis forgesigi la prokurorojn kiuj nomis ĝin “krima organizo”, superŝutante tiajn novaĵojn per naciismaj fra-pfrazoj kaj aliaj novaĵoj pri la fifaroj de la katalunoj. Plie en la sama jaro la militantoj de la eŭska ETA anoncis finon de armita agado, kaj la hispana naciismo devis trovi alian internan malamikon por pravigi la uzon de ŝtataj institucioj kontraŭ konkurantaj naciismoj. Por kaŝi sian kontraŭleĝecon per fumkurteno, apelacion post apelacio, la PP kaj la Konstitucia Kortumo paralizis la laboron de la kataluna parlamento kaj puŝis katalunajn politikistojn en senelirejon, por fabriki senhelpajn “krimulojn” kiel propekajn kaprojn. Jen do kiel Rajoy sukcesis rivali kun Erdoğan en Turkio kaj Orban en Hungario, mobilizante la amasojn kontraŭ la katalunoj samkiel aliuloj tion faras kontraŭ la enmigrintoj, la ciganoj, la ateistoj aŭ la kurdoj. Je la nomo de la nacio, li sukcesis igi la hispanojn akcepti limigojn de bazaj civitaj rajtoj, kiel ekzemple per la tiel nomata “buŝo-ŝtopila” leĝo. Kaj, kiel en la okazo de Orban, Eŭropa Unio faras nenion por haltigi tiun aŭtoritatisman degeneron.

INTERNACIA LABORLINGVO La praktika aplikado de Esperanto tra la mondo

En la pasinta numero ni komentis la rezultojn de enketo farita per Facebook (“Kio Esperanto estas por vi, en la praktiko? Bonvolu komenti vian respondon”). Nun ni prezentos al vi kelkajn komentojn, kiuj siavice estas komentitaj de la rubriko *Internacia Laborlingvo*.

ESPERANTO ESTAS GRAVA AFERO EN LA VIVO DE MULTAJ

Živanko Novakov: “Afero kiu min tenas viva!”

Bertil Wennergren: “Esperanto estas mia vivo.”

Keiko Snarberg: “Kaj mi ne vivus sen ĝi.”

■ Fakte, Esperanto estas la granda pasio de multaj esperantistoj, kiuj ofte ekstreme pasiĝas pri sia “amata ĉevaleto” kaj pretas sin dediĉi ĝisfunde al ĝi.

JUSTA KAJ DEMOKRATIA

César Dorneles: “Esperanto estas,

laŭ mia opinio kaj laŭ tiu de multaj homoj, la plej justa kaj demokratia solvo kiel ilo por la internacia komunikado. La resto estas konsekvencoj.”

■ Certe, jes. Sed la popolamasoj prifajfas la lingvan justecon kaj demokration. Esperanto bezonas sin prezenti kiel praktikan lingvon, preferinde kun sia interna ideo, kaj kompreneble ne preterlasante klerigon pri justeco kaj demokratio. Se paroli pri konsekvencoj, ili venos depende de tio, kion la esperantistoj faras per Esperanto. Se ĝi estos nur hobia aŭ ankaŭ laborlingvo por multaj, la konsekvencoj estos tute malsamaj.

LINGVO KIEL LA CETERAJ

Sebastian Quintero Santacruz: “Lingvo, kiel la ceteraj. Same grava.”

■ Ne malmultaj esperantistoj prifajfas la “internan ideon” de Esperanto. Sed atentu, ke

“Lingvo, kiel la ceteraj” havas ampleksan signifon.

MISKOMPRENO

Fredrik Spatserkäpp: “Mi esperas ke Esperanto povos ŝanĝi la mondon en la estonteco. Sed nuntempe ni esperantistoj ne estas multnombraj. Ni ne havas la necesan povon por ŝanĝi la mondon. Bedaŭrinde. Tial mi okupiĝas pri Esperanto nur kiel hobia.”

■ Oni ĝenerale miskomprenas, ke “ŝanĝi la mondon” estas afero de pli ol unu generacio. Pro tio, ke esperantistoj lasas al la estontaj generacioj la laboron komenci tuj uzi Esperanton kiel laborlingvon, oni fakte rezignas pri la rolo, kiun ĝi povus havi tuj en la ŝanĝo de la mondo. Fakte ĝi jam ŝanĝas la mondon, kvankam tre etskale, sed la konsciigo pri nia povo ebligas fari el Esperanto grandskalan fenomenon.

HOBIO

Janka Hencova: “E-o estas mia hobia kun aliaj aktivecoj.”

■ Ĉiam estos E-hobiuloj kaj tio ne estas malbona faktoro, fakte.

HOBIO FARIĜIS PROFESIO

Halina Gorecka: “lama hobia kaj ŝat-okupo iĝis profesio.”

Se tio fariĝos tendenco, Esperanto povos salti al multe pli alta ŝtupo.

TURISMA LINGVO

Radikala Finvenkistino: “Mi pensas, ke Esperanto ege utilas al mi kiel lingvo de turismo.”

■ Jes, sed ne nur. La fondota neregistara organizaĵo Sociala Lingvo (vidu anoncon sur la lasta paĝo de Spegulo) havas ambician planon por disvolvi la E-socialan turismon.

LINGVO POR ĈIUTAGA UZO

Aleksandra Watanuki: “Mia

respondo estas: lingvo por ĉiutaga uzo. (Strange, ke ĝis nun ne estas tia respondo, ja estas ankaŭ aliaj, kiuj uzas Esperanton ordinarie en sia ĉiutaga vivo, ĉu ne?)

■ Jes, por ĉiutaga uzo, same kiel la angla estas nuntempe por multaj homoj. Sed ne ĉiutaga komuna lingvo nur por praktikaj aferoj, ĉu? Ni ja bezonas adopti Esperanton kiel laborlingvon, sed ĝi estas pli ol tio. Esperanto estas unika fenomeno.

KIU VOLAS?

Penelope Vos: “Antaŭ Esperanto, la mondo estis sen Esperanto. La mondo ŝanĝiĝis kaj ne plu estas sen Esperanto. Neniu povas scii ĉu la ŝanĝo grandiĝos, sed eblas agi en tiu direkto se oni volas. Mi volas.”

■ Heroldo de Esperanto volas.



Krizo kaj malkrizo en la Esperanto-movado

Multaj ŝatas paroli pri krizo. Temas ĝenerale pri gazetistoj, kiuj havas la problemon plenskribi la gazeton antaŭ la fino de la semajno. Multaj el tiuj gazetistoj krome estas tiel nomataj bulvardaj gazetistoj, kiuj aparte ŝatas flankajn personajn krizojn (la prezidanto de la klubo A amindumas la sekretariinon de la klubo B, kiu ŝtelis la ĉampanon dum la zamenhofa festo).

Dirinte tion, ni venu al la krizo de UEA aŭ de la Esperanto-movado. Ĉu ĝi ekzistas? Se oni rigardas la komunumon dum la lastaj monatoj, oni havas panoramon de granda entuziasmo ĉe la lokaj agantoj. En Peterburgo (ĉu sankta aŭ ne) oni aranĝas grandiozan eventon kunlabore kun la belga konsulejo por festi la 15-an de decembro. En multaj aliaj ĉefurboj de la mondo oni aranĝas similajn solenaĵojn kune kun la nemankebla pola ambasadejo. En ĉiuj vilaĝoj oni almenaŭ solene vespermanĝas kaj kantas tradiciajn esperantajn kaj kristnaskajn kantojn en Esperanto. La entuziasmo neniam pli zenitis. Kaj kion diri pri la lastatempaj alparoloj pri Esperanto al UN kaj Unesko? La reto daŭre, ade kaj ree kopias la informon de Berlino al Suda Ĉilio.

Eĉ en Britujo, kie eble pro la brita sento pri privateco oni ne kuraĝas rekte varbi por Esperanto, aperas ĉiam pli multnombre gejunuloj, kiuj mem malkovris Esperanton kaj duonlernis ĝin per Duolingo kaj volas membriĝi en lokaj grupoj. Eble pro la konata brita ĝentileco oni ne kuraĝas rifuzi pri la aliĝo.

Tio estas ne krizo sed entuziasma malkrizo.

Tamen iuj estas en krizo. La krizo atakas la administrajn strukturojn de la movado, kie la

membrigoj iĝas ĉiam pli maloftaj kaj neniu kuraĝas elpensi manieron vivi per donacoj pro intencitaj agadoj kaj laŭgrade forlasi agadojn, kiuj ne plu havas aldanan valoron. Paperaj membro-revuoj, ekzemple, venas kun informoj jam legitaj en la reto antaŭ tri monatoj. Jarlibroj prefere estu paĝo en la reto. Libroservo estu speco de Amazon, ktp.

Ofte ankaŭ la anoj de lokaj grupoj sentas senton de krizo, kiam ili rigardas la malmultajn partoprenantojn de la ĉiusemajnaj klubaj kunvenoj, kiuj estas ĉiam la samaj sed iom pli maljunaj. Tiu modelo ankoraŭ eltenas, sed la manieroj renkontiĝi almenaŭ inter junaj homoj ŝanĝiĝas kaj baziĝas sur rendezuado pere de la komput-telefonoj, kiujn ĉiuj havas en la manoj.

Kion konkludi? La sceno estas tiu de granda popola batalado per gerilaj rimedoj, kaj de sukcesa batalado, dum la generaloj de la regula armeo ne plu sukcesas kunteni regulan armeon. Ili renkontas la problemon, ke neniu plu volas aliĝi al la regula armeo, sed preferas batali individue, dum la registaro subvencias la armeon surbaze de la nombro de la regulaj soldatoj.

Se oni interesiĝas pri la venko, en nia okazo pri la devastigo de Esperanto, oni povas esti kontenta. Ekzemple la revo de generacioj, ke la Unesko-kuriero aperu en Esperanto, ĵus realiĝis danke al ĉinaj esperantistoj. Cetere la ĉina registaro nun subvencias ankaŭ la aperon de tiu kuriero en la angla kaj en la franca (aferoj en la mondo ŝanĝiĝas al neantaŭvidita direkto).

Se oni interesiĝas pri la pluvivado de organizaĵoj, oni ŝanĝu ilin al pli modernaj formoj. Ĉio devas ŝanĝiĝi, por ke nenio ŝanĝiĝu.

SERIO - MEMORINDAJ ESPERANTISTOJ 5

Andreu Nin, la internaciisma revoluciulo

Xavi Alcalde

Kiam oni pridiskutas la hispanan intercivititan militon, ne ĉiam menciigas, ke tiam okazis ankaŭ socia revolucio. Dum pluraj monatoj de 1936, fabrikoj kaj kampoj estis kolektivigataj kaj la proletaro estris la socion. Ne hazarde, inter tiuj revoluciuloj ĉefrolis ankaŭ esperantistoj, kiel Andreu Nin [Andrés Nin Pérez] (1892-1937).

Filo de ŝuisto kaj kamparanino, Nin esperantistiĝis en 1907. Du jarojn poste li kunfondis la asocion Frateco en la kataluna vilaĝo Vendrell, kie li pasie instruis la lingvon. Tiam li verkis fervorajn artikolojn pri la internacia lingvo en lokaj ĵurnaloj. Poste li translokiĝis al Barcelono kaj aniĝis al la grupo Barcelona Stelo. Estante li eĉ uzos la zamenhofan lingvon en politikaj mitingoj.

Post pluraj jaroj kiel instruisto en proletaj medioj, en 1914 Nin fariĝis ĵurnalisto. Politike katalunisma maldekstrulo, li iĝis unue socialisto kaj poste anarkiisto. Tiam okazis la rusa revolucio kaj Nin vizitis Rusion por rekte ekkoni la situacion. Li restis fascinita. Ekde 1921 li loĝis en Moskvo kaj fariĝis figuro de la Komunista Internacio kaj de la Internacio de la Ruĝaj Sindikatoj, kunlaborante kun sovetaĵ gvidantoj kiel Lenin kaj ĉefe Trockij.

En 1930, Nin revenis al Barcelono, kie komenciĝis floranta epoko por la utopiaj movadoj kaj progresemaj ideoj, nome la Dua Hispana Respubliko. Tiam li senlace disvastigis sindikatismajn, kontraŭfaŝismajn kaj (heterodoksajn) komunismajn ideojn, sed ankaŭ la rajton je



Pro la nula agado de la eŭropaj demokratioj, la hispanaj respublikanoj devis akcepti la helpon de Stalin

memdetermino de la popoloj. Dume, li elstare tradukis rusajn verkistojn, kiel Dostojevskij, Lenin, Trockij, Ĉeĥov, Zoŝenko... kaj ankaŭ la francon Jules Vallès, famiĝintan en la Pariza Komunumo.

En 1935 Nin kunfondis POUM (katalune Partit Obrer d'Unificació Marxista, hispane Partido Obrero de Unificación Marxista), laboristan partion de marksisma unuiĝo. Alivorte komunisma sed kontraŭstalinisma partio, kiu ege gravus en tiu epoko. Li fariĝis ĝia politika sekretario.

Post unu jaro okazis la puĉo kontraŭ la demokrata reĝimo en Hispanio, kiu malvenkis interalie en Katalunio pro la rezisto de la popolo kaj ĉefe de la anarkiistoj, kiuj tiutempe multnombriis. Dum en la tuta lando la situacio transiris al trijara intercivitana milito, en pluraj regionoj la proletaro ekestris la socion, okazigante unikan eksperimenton de socia revolucio grandskale. Koncerne al ĝiaj signifaj trajtoj, tiu revolucio estis kontraŭklerikala kaj proponis racian klerigadon. Administre, ĝi celis horizontalan

kaj federan organizadon, ekonomie bazitan sur la kolektivismo de fabrikoj kaj kampoj, prizorgataj de la laboristoj mem. Parenteze, indas memorigi, ke en tiu epoko pluraj ĉefrolantoj – interalie la anarkiistoj, POUM kaj la kataluna registaro – uzis Esperanton regule en sia propaganda agado.

En tiu konteksto kreiĝis unuigita kontraŭfaŝisma registaro en Katalunio, kaj Andreu Nin iĝis ĝia respondeculo pri justico. Tiumaniere finiĝis la senkontrola perforto en la respublikana flanko okazinta dum la unuaj monatoj de la milito. Temis pri polemika agado, kiu inkluzivis la kreon de tribunaloj pri popola justico, kiuj foje kondamnis homojn al mortpuno.

En majo 1937, la respublikana flanko disiĝis en tiujn, kiuj subtenis la revolucion (anarkiistoj kaj POUM), kaj tiujn, kiuj opiniis ke endas unue venki la faŝistojn (socialistoj, komunistoj kaj katalunistoj). En Barcelono kaj en aliaj urboj ambaŭ flankoj batalis perforte. Sekve POUM fariĝis kontraŭleĝa kaj multaj el ĝiaj gvidantoj estis arestitaj. En junio oni arestis ankaŭ Nin kaj mortigis lin post torturo, ŝajne sekvante instrukciojn de la soveta reĝimo.

Verŝajne la morto de Andreu Nin signifis la finon de tiuj belaj idealoj de la Hispana Respubliko. Pro la nula agado de la eŭropaj demokratioj, la hispanaj respublikanoj devis akcepti la helpon de Stalin. Ĉu eblas antaŭenigi progresemajn ideojn kaj samtempe kunlabori kun diktatoro? Ĉu en tiaj eksterordinaraj cirkonstancoj oni povintus agi alimaniere?

VIDPUNKTO

Kien la Esperanto-movado?

Andrej A. Peĉenkin

“Mi ne sciis ke ekzistas Movado en via urbo”, skribis al mi, danke al feliĉa cirkonstanco, redaktoro de neoficiala beletra almanako en letero kiu eltiris min el plurjara Esperanto-soleco, sen ion legi kaj iun alparoli. Mirinde, tiu bona homo nomis mian konatecon kun la Esperanta “Movado”. Sekvis mia avida penetra en la agadon: legi, vizitadi renkontiĝojn, frande uzi la lingvon, vivi en la medio, kreadi, distriĝi, esti ano de io preskaŭ mistike grava kaj valora, kaj miri: kial ĝis nun la nefinraciiginta homaro ne konsideris akcepti la taŭgegan ilon por solvi la “lingvan diversecon”?

La zamenhofa kampanjo pri dek mil “promesoj” evidente ne povis sukcesi, en tiuj legendaj jaroj kiam ekis “nia kara afero”, sed al “nia kara afero” senhaltigeble aliĝadis homoj. Por fari kion? Legi, kontaktiĝi, unuiĝi... Ĉiu E-komencinto kaj aliĝinto al la lingvo devis anime decidi ĉu ion fari por la afero (“Movado”) aŭ ĉu nur profiti (en plej diversaj sencoj). Nia longeta 130-jara historio konas elstarajn movadanojn, sen kies kontribuoj la tuta afero nun eble estus alia. Sed ĉu la “Movado” vere nepras? Oni ja povas “libere” uzi la jam tiom nombrajn valorojn kaj ilojn rilatajn al Esperanto sen aniĝi al ajnaj organizaĵoj. Ĉu la valorojn oni kreas pro ies organizaĵa/estra administrado (nu, temas pri nia kulturo)?



Ni agu mem, nemanipulate de potenculoj, kun pliiĝanta kompreno kaj konscio pri tio kio reale estas nia granda mondo

La historia pendolo devis krei raŭmismon, kiu ankaŭ estas “Movado”, kvankam ĝi refutis la “praajn celojn” (kiujn? – ha, la oficiala enkonduko de nia kara lingvo en ĉies uzon!) kaj estis la

unua kiu formulis klare la valorojn de la Esperanto-kulturo mem... Sed ĉu la “Movado” ĉesu pro tiu ekkonscio? Evidente ne, sed en kio konsistas la faroj de la Esperanto-parolantoj? Kaj kio gravas? Ĉu regule kunvenadi klubeje por kuntrinki teon kaj sin distradi ĝuante la fakton mem de la kunveno? Aŭ, prefere, liveri al aliaj gravajn konojn, ideojn – kulture, socie, politike?

Eble, kontraste al la iame taŭga paradigmo pri desupra oficialigo/enkonduko (en internaciajn instituciojn/lernejojn ktp) de nia lingvo, venu nia lingvo-politiko, “kolekti kaj prizorgi la naskiĝantajn juvelojn”. En la nuna plimalfermiĝanta monda vilaĝo kun ties pli frue neimageblaj informaj kaj komunikaj ebloj, ni ĉiuj serĉu

unu la alian laŭbezone – diversaj en unueco.

Konklude, nur liberaj kaj libervolaj homoj kun deca kaj inda respondeco pri siaj farotaĵoj, konsciaj pri siaj kapabloj kaj celoj, pretaj kontribui tion kio estas vere valora, povas reale antaŭenigi la “Movadon”. Ju pli da retrokuplado, des pli efike kreiĝos novaj aferoj, iuj eble ĝis nun eĉ neimagitaj. Temas ne nur pri teĥnologio. Ĉio dependas de ĉiu aparta persono en ajna momento de ties vivo.

Kiuj volas organiziĝi kaj estri/estrati, tiuj faru tion. Ni agu mem, nemanipulate de potenculoj, kun pliiĝanta kompreno kaj konscio pri tio kio reale estas nia granda mondo. Eĉ guto malgranda, konstante frapante...

La Esperanto-movado krizas. Vivu la krizo!

El la redakcio

Heroldo de Esperanto kredas, ke estas necese transformi la krizon de la movadaj asocioj en diversajn oportunaĵojn por reinventi la E-agadon, ĉar tio, kio krizas, ne estas Esperanto mem – kiu bone fartas, dankon! – sed la modelo de la tuta agado de la esperantistoj tra la tuta mondo.

Oni multe diskutas, opinias, akuzas, riproĉas, kritikas, proponas, revas pri novaj tempoj, sed neniun ankoraŭ demandis sin, ĉu la labormaniero, la premisoj, la principoj kaj gvidlinioj de la tuta E-movado ne kadukiĝis, ne rustiĝis, antaŭ la imploda forto de la kombinaĵo de du ingrediencoj de la historio: la tutmondiĝo, kun siaj ebloj sur la kampo de komunikado kaj informado, kaj la fakto, ke Esperanto forlasis sian infanan aĝon, sian adoleskantecon kaj nun estas preta roli kiel adolta

lingvo kaj preni sur sin la mision fariĝi laborlingvo. Jes ja, *Heroldo* insistas kaj plu insistos, ke la ora ŝlosilo, kiun la esperantistoj havas en la manoj, estas la ideo – ne surpriziĝu –, ke Esperanto havas potencialon por roli kiel internacia lingvo! Ne de malpleno de izolitaj idealistoj, kvaŭzaŭ en geto, kontentaj pri sia volontula sklaveco je la limoj starigitaj de la esperantistoj mem. Ni parolas pri internacia lingvo de la mondo. Pri laborlingvo por plena uzado sur la kampo de edukado, kulturo, scienco, diplomatio, internaciaj rilatoj kaj partneriĝo inter ĉiukampaj NRO-j, solidara esperantista ekonomio (kaj ankaŭ merkata ekonomio – kial ne?), sociala turismo, novbabelismo, Esperanto-landologio, defendo de ĉiuspecaj rajtoj (inkluzive de la homaj rajtoj; ne nur de la lingvaj rajtoj), internacia komerco, libroeldonado, servoj, teknologio, gazetaro, distribuindustrio, muziko, kinoarto ktp.

La esperantistoj tro alkroĉiĝis al la ideo, ke la nura farena laboro estas “diskonigi kaj instrui Esperanton!”.

Ne, ne estas! Se tiel, Esperanto estas kiel la plej bona kuko de la mondo; la plej facile farebla, bezonanta malmulte da ingrediencoj, troveblaj ĉie tra la mondo kaj tre malmultekostaj.

— Jen la plej gustuminda kuko de la mondo – ĉiuj esperantistoj ripetis senĉese kaj laŭte al ĉies oreloj.

— Venu, venu preni la recepton, venu lerni kiel kuiru ĝin per legado de nia kuirlibro.

Kaj la malsatantoj demandas al esperantistoj:

— Bonvolu doni al ni pecon de tiu kuko!

La esperantistoj respondas:

— Ni estas fakuloj nur pri la recepto. Ni havas nek fornon, nek alumetskatolon, nek la ingrediencojn, sed la recepto estas nia! Temas pri unika recepto.



Kaj la malsatantoj redemandas: — Ĉu vi pretas organizi praktikan sesion por instrui nin lerni kuiru tiun mirindan kukon?

La esperantistoj respondas unuvoĉe:

— Ne, ni ne organizas tiajn kursojn, tamen ni pretas disponigi al vi tute senpage la recepton. Cetere, ni ne ŝatas monon. Ni pretas nek investi monon en la kuirado de nia kuko, nek postuli pagon por instrui en la praktiko kiel kuiru ĝin. Ni pretas uzi

niajn malmultajn kaj malvigajn fortojn por akiri fornon, ingrediencojn, alumetskatolon cele al kuirado de nia kuko por manĝi kaj manĝigi. Nia misio estas diskonigi la recepton. Niaj nepoj nin benos kaj zorgos pri la kuirado de la kuko, ne ni.

Kaj tiel, sen kuko konkrete manĝebla, la recepto-diskonigantoj vidas siajn kuirejojn malpleniĝi kaj kredas, ke farbado de la muroj de la kuirejoj solvos la problemon. La Esperanto-movado krizas. Vivu la krizo!

Esperantujo bezonas novan principaron

La Principaro de Frostavallen, el 1956 (<http://bit.ly/Frostavallen>), kiun ni transskribas ĉi-sube, certe ludis sian rolon, sed ĝi ne plu taŭgas por inspiri la modernan Esperantujojn. Ni ja bezonas novan principaron, kiu estu pli ampleksa ol tiu de Frostavallen, ne limigante

sin al informado. La esperantistoj bezonas grandajn defiojn, kiuj stimulu ilin superi la krizon de sia E-asociaro, ja sur la kampo de moderna komunikado, sed ankaŭ sur la kampo de strategio, celaro, strukturo de la movado kaj superado de dogmoj bremsantaj la evoluon

de la karaktero de la tuta Esperanta agado.

Kiu redaktos tiun principaron? *Heroldo de Esperanto* sin lanĉas kiel ĉefmotoron kaj kunordiganton de la iniciato redakti ĝin, spronate de la devizo “La E-movado krizas. Vivu la krizo!”. Jes ja, ĉar la krizo igos la

esperantistaron ne nur adaptiĝi al la modernaĵoj, sed ankaŭ repensi sian rolon en la mondo, se paroli pri unika internacia komunumo, kiu uzas veran internacian lingvon en internaciaj rilatoj.

Do, se vi volas partopreni la skupon kiu redaktos tiun gravegan prin-

ciparon, kiu espereble estos lanĉita okaze de la UK en Lisbono aŭ en alia eŭropa evento dum la somero en tiu kontinento, bonvolu plenigi la formularon ĉe <http://bit.ly/Frostavallen> por ricevi pliajn informojn.

Heroldo ofte raportos pri la evoluo de tiu ideo.

Principaro de Frostavallen

La Fundamenta Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo, konata poste kiel Principaro de Frostavallen, estis akceptita de la reprezentantoj de la Landaj Informaj Fakoj de UEA en Frostavallen, Svedio, la 30-an de julio 1956. Ĝin formulis Ivo Lapenna; poste la teksto iomete ŝanĝiĝis dum la kunveno.

I. CELO

1. Tri branĉoj de aktivadoj: informado; instruado; praktika utiligo. Nur paralela, bone studita kaj celkonscia agado sur la tri kampoj povas doni kontentajn rezultojn kun daŭra valoro.

2. La celo de la informado: a) diskonigi la Internacian Lingvon kaj ĉion kio estas kreita en ĝi aŭ pere de ĝi; b) detruigi la antaŭjuĝojn, precipe en la ŝlosilaj pozicioj de la kulturo kaj de la publika vivo; c) instigi al lernado de la lingvo kaj altiri novajn adeptojn al la Movado.

II. NUNA STATO

3. Fondiĝo: UEA refondis sian propagandan fakon en Bournemouth (1949), transformis ĝin en Informan Fakon (IF) en Parizo (1950) kun Kongresa Gazetara Servo (1950). Sekvis reorganizado aŭ organizado de la landaj Informaj Fakoj.

4. Rezultoj: Ĉiujare, krom en 1954, estis publikigitaj la rezultoj de informado en mondaj kadroj en Esperanto. Ili montras kontentigan progreson, sed ankaŭ bezonon pri plua ampleksigo kaj kvalita plibonigo.

III. ORGANIZO

5. Informa Fakoj de UEA (gvidata de la Ĝenerala Sekretario):

a) Gazetara Servo: 1) bulteno kun novaĵoj (en Esperanto por la landaj IF; en la angla kaj en la franca por la grandaj presagentejoj kaj por la ĉefaj gazetoj en landoj sen movado); 2) fotoservo; 3) artikola servo; 4) radio-servo; 5) se eble, televida servo.

b) Kongresa Gazetara Servo: 1) bulteno kun novaĵoj en Esperanto kaj nacilingve; 2) fotoservo; 3) artikola servo; 4) radio-servo; 5) se eble, televida servo.

c) Ekspozicioj: 1) organizado de la Universala Ekspozicio en diversaj landoj kaj konstanta kompletigado de la materialoj; 2) sugestoj rilate la organizon de aliaj ekspozicioj laŭ la modelo de la universala.

ĉ) Afiŝoj kaj flugfolioj: Prizorgado de tekstoj kaj taŭgaj desegnaĵoj; eventuala eldonado en diversaj okazoj kun internacia karaktero.

d) Filmoj, radio, televido: Sugestoj al landaj IF pri utiligo de tiuj rimedoj. e) Prelegvojaĝoj: Organizo pere de la landaj asocioj kaj vasta utiligo por informado pere de gazetoj, radio, afiŝoj k.s. laŭ la cirkonstancoj. f) Gazetaraj Konferencoj: Utiligo de ĉiu pli grava evento por aranĝo de gazetaraj konferencoj.

6. Landaj IF (gvidataj de malgranda komitato aŭ de komisiito): Organizo de la samaj branĉoj laŭ la modelo de la IF de UEA.

7. Lokaj IF (gvidataj de komisiito aŭ malgranda komitato): Organizo laŭ la modelo de la landa IF kun adapto al la

lokaj cirkonstancoj.

IV. FUNKCIOJ

8. IF de UEA: a) harmoniigo de la tuta laboro; b) rekta informado al internaciaj instancoj kaj en regionoj sen movado; c) konsilioj kaj helpo per liverado de informoj, artikoloj kaj materialoj al la landaj IF kaj al la rektaj kunlaborantoj en landoj sen movado.

9. Landaj IF: a) realigo de la sugestoj de la IF de UEA; b) organizo de la informado sur siaj teritorioj; rekta informado al tutlandaj instancoj; c) konsilioj kaj helpo al la lokaj IF per liverado de artikoloj, novaĵoj, flugfolioj, afiŝoj kaj aliaj materialoj.

10. Lokaj IF: a) realigo de la konsilioj de la landaj IF; b) rekta informado al la loka kaj regiona publiko.

V. METODOJ

11. Diversaj eblecoj: a) artikoloj; b) mallongaj informoj (nepre objektivaj); c) publikaj prelegoj por ĝenerala publiko; ĉ) prelegoj en specialaj medioj (sciencaj institucioj, literaturaj societoj, sindikatoj, studentaj kluboj, diversaj asocioj ktp); d) radioprelegoj kaj informoj; e) afiŝoj; f) flugfolioj; g) sloganoj; ĝ) ekspozicioj; h) filmoj; h) varbado de apogantoj de UEA; i) aliaj eblecoj laŭ la landaj aŭ lokaj cirkonstancoj.

12. Nur intensa utiligado de ĉiuj eblecoj paralele efikas pozitive.

VI. KVALITO

13. Ĉefaj eraroj:

a) nomi la lingvon artefarita, helpa, verda k.s.; oni ĉiam nomu ĝin aŭ Internacia Lingvo aŭ Esperanto;

b) superflue menciadi diversajn projektojn pri komuna lingvo;

c) ne distingi nete inter Esperanto kiel vivanta lingvo kaj tiuj projektoj, se la cirkonstancoj devigas paroli pri ili;

ĉ) uzi en nacilingvaj tekstoj esperantaj esprimoj, ekz. “samideano”, “Majstro”, “verdstelanoj” k.s.;

d) skribi pri Esperanto en nekorekta nacia lingvo;

e) nomadi la informadon pri Esperanto “propagando”;

f) doni al la Esperanto-movado sektecan karakteron (tro multe da steloj kaj flagoj, kantado de la himno kaj aliaj kantoj en nekonvenaj tempo kaj loko, strangaĵoj en la vestoj dum kongresoj kaj aliaj publikaj kunvenoj k.s.). La eraroj en la informado malproksimigas de Esperanto dekmilojn da personoj kaj kaŭzis fortan kompromitiĝon de la movado en multaj medioj.

VII. KONSTANTECO KAJ KAMPANJOJ

14. Por altigi la kvaliton estas necese akcenti ĉion, kio montras la kulturalan kaj praktikan valorojn de la lingvo; do literaturon, sciencajn verkojn, ISU, Belartajn Konkursojn, delegitan reton, precipe helpon dum vojaĝoj kaj en profesia laboro. La digno de ĉiuj publikaj aranĝoj spegulu la respekton, kiun la esperantistoj mem havas por la Internacia Lingvo.

15. Konstanteco: La informado devas esti konstanta dum la jaro, por ke la publiko senĉese konsciu pri la ekzistado kaj funkciado de Esperanto.

16. Kampanjoj: Specialaj kampanjoj, kun utiligo de ĉiuj metodoj, devas esti farataj antaŭ la komenciĝo de la kursoj, okaze de kongresoj, je la

Zamenhof-tago kaj ĉiam, kiam por tio prezentiĝas taŭga okazo.

VIII. MEDIOJ ATINGOTAJ

17. Ĝenerala informado: Ĝi estas direktita al la larĝa publiko kaj havas la celon krei ĝeneralan favoran agordon.

18. Speciala informado: Ĝi estas direktita al specialaj medioj, kies intereso transiras la limojn de iliaj naciaj lingvoj (sciencistoj, diversaj fakuloj, komercistoj, membroj kaj adeptoj de internaciaj organizaĵoj kaj movadoj) kun precipa atento al la junularo kaj la studentoj.

IX. KONKLUDO

19. La esperantistoj mem estu pli forte konvinkitaj pri la praveco de la propra afero kaj pli kuraĝe argumentu kontraŭ la eraraj prezentoj. Ĉiu esperantisto konstante klopodu larĝigi kaj profundigi sian lingvan scion. Ĉiu esperantisto ĉiam portu la esperantan insignon (ne multajn, sed unu). En fakaj aŭ specialigitaj organizaĵoj la esperantistoj levu sian voĉon. La informado estu ĉiam adaptita al la medio, en kiu oni faras ĝin, kaj venu prefere de tiu medio mem.

20. Ĉiuj branĉoj de informado estu egale atentataj kaj paralele aplikataj. La maniero de informado varias de unu lando al la alia kaj de unu medio al la alia. Sekve, tiuj ĉi bazaj principoj estu aplikataj kun elasteco kaj kun konsidero de la apartaj cirkonstancoj.

21. La tuta agado, paralela kaj harmonie kunordigata en la tuta mondo, havu daŭre la celon diskonigi la lingvon, instigi al lernado kaj praktika aplikado de Esperanto, venki la ŝlosilajn poziciojn en la kultura vivo kaj definitive favorigi la publikan opinion al Esperanto.

ARTIKOLOJ

ILEI en la nuntempa moviĝanta mondo

Mireille Grosjean *

Ĉio moviĝas. La socio moviĝas, la kutimoj ŝanĝiĝas. La lerniloj evoluas, aperas novaj. Ankaŭ ILEI moviĝas. Kio estas krizo? Krizo estas tikla momento, kie la movoj estas pli fortaj. Krizo povas gvidi al pli pozitivaj momentoj aŭ al ia rigidigo aŭ fino. Mi supozas, ke la redaktoskipo de Heroldo elektis tiun temon por skui la legantojn. Bone, tio povas esti pozitiva strategio.

Venas petoj al ILEI: en diversaj lokoj oni bezonas Esperanto-instruistojn. Konsekvence ILEI lanĉis fine de 2017 programon por lertigi kaj diplomigi geinstruistojn. Temas pri *Esperanto Instruista Trejnado* (EIT), kiu povas okazi danke al kunlaboro kun Edukado.net, *Reta Instruista Trejnado de Esperanto (RITE)* kaj Katalin Kovats. Entute povos diplomigi pli ol 60 personoj dum 2018. EIT okazas en tri malsamaj urboj: RITE plus MADRIDO, ĉar la ĉeesta staĝo okazos dum la ILEI-kongreso en julio en Madrido, Hispanio; RITE plus POZNANO, Pollando, ĉar dufoje la kandidatoj devos aperi en Poznano por la staĝo; RITE plus KOTONUO, ĉar la kandidatoj havos ĉeestan staĝon en Kotonuo, Benino. Ĉiuj detaloj legeblas ĉe www.ilei.info.

ILEI atenteme konstruas la enhavon de sia organo *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) kaj evoluiĝas sian “juvelon” *Juna Amiko* (JA). La iom nova gvidlinio de JA estas,

ke la enhavo estu same interesa por plenkreskuloj kiel por 10-jaraj infanoj aŭ pli aĝaj adoleskantoj. Juna Amiko nun aperas kvarfoje jare plenkolore. Do laŭ aspekto kaj aperritmo temas kvazaŭ pri revolucio. La membroj de ILEI, kiuj abonas IPR-n kaj JA-n en papera formo, estas Superaj Membroj kaj ricevas rabaton.

Ĉiuj membroj de ILEI havas liberan aliron al la trezoroj de Edukado.net, tio estas la giganta kolekto de ekzercoj (pli ol 800), kiuj ebligas tre varian instruadon. Tion ILEI povis enkonduki, en interkonsento kun Katalin Kovats, la 1-an de januaro 2018.

ILEI havas sep-personan estraron. ILEI havas komisiiton por membroprizorgado kaj komisiiton por la aperigo kaj laboro de ILEI dum Universala Kongreso de UEA. ILEI ne havas Centran Oficejon. ILEI havas la kutimon detale raporti pri sia agado kvarfoje jare publike. ILEI laboras en Esperanto; por disponigi raportojn en la angla aŭ franca por Unesko aŭ aliaj ekstermovadaj instancoj ILEI havas du tradukistojn, kiuj liveras nacilingvaj tradukojn ene de 12 horoj. La

estra-ro voĉdonas rete kaj kunvenas per Skajpo kun sia kasisto en Kalifornio je la sepa matene, kun membro en Kuritibo, Brazilo, kun du membroj en Serbio kaj Svislando, kun unu membro en Sud-Afriko, kun unu membro oriente de Moskvo kaj la vic-prezidanto en Ĉinio je la 22-a horo vespere, laŭ diversaj horzonoj.

ILEI havas perantojn en pli ol 70 landoj. Detaloj pri tio videblas en la paĝaro www.ilei.info. Sekcioj kaj reprezentantoj agadas, instruas kaj raportas. Dum la lastaj kvin jaroj okazadas multo pozitiva; iuj

parolas pri “nova” ILEI. Tamen la membraro ne brile kreskas.

Ĉu ni parolu pri krizo? Mi dirus ne. Nun regas pozitiva evoluo, eĉ se ILEI ne gajnas multajn novajn membrojn. ILEI kaj UEA manenmane lanĉis la *Jaron de la Lernantoj* (2016-2017) kaj kadre de ĝi la esploroj kaj priprenoj fokusiĝis ĉe la lern-fenomeno. La geinstruistoj devas kompreni la fenomenon por adapti sian sintenon al tio, estante pli akompanantoj ol prelegantoj.

La ĉiujaraj konferencoj de ILEI altiras ĉiam pli da membroj kaj ricevis la nomon Kongreso. En Pusano, Koreio, okazis en julio 2017 la 50-a kunveno unufoje sub la nova nomo. Ĉirkaŭ 200 personoj partoprenis. La programo estas bunta kaj la prelegoj bonkvalitaj. Okazas komitatkunsidoj, diversaj kursoj, prelegoj, koncertoj, ekskursoj, lingva festivalo, literatura kafejo post la komenca frandvespero. En julio 2018 la ILEI-Kongreso okazos en Madrido, Hispanio, antaŭ la UK en Lisbono, Portugalio.

ILEI prizorgas movadajn ekzamenojn pri lingvokapablo. Ili plu ekzistas post la apero de KER-ekzamenoj, tio estas ekzamenoj kun

ŝtata agnosko Komuna Eŭropa Referenckadro: jen la signifo de KER. Pro historiaj kialoj KER-ekzamenoj estas en la manoj de UEA. Granda diferenco estas, ke KER-ekzamenoj taksas nur la lingvajn kapablojn. En la lingvaj ekzamenoj de ILEI estas demandoj pri kulturaj kaj movadaj konoj (ili pezas je 20% de la suma poentaro).

Nun okazas giganta skuo fare de ILEI per la lanĉo de tri programoj por *Esperanto-Instruista Trejnado* (EIT), kun ĉeesta deviga parto konsistanta el ekzameno kaj vera leciono farata de ĉiu kandidato. En unu EIT-kurso la fizika kunveno okazos en Madrido, Hispanio, okaze de la ILEI-kongreso. En unu EIT-kurso la fizika kunveno okazos en Poznan, Pollando, en februaro kaj septembro. En la lasta, la tria EIT-kurso, la fizika kunveno okazos en Kotonuo, Benino, en novembro. Sume 68 personoj povos diplomigi (24 en Madrido, 24 en Poznan, 20 en Kotonuo). Se tio ne konkrete, tiam mi parolos pri krizo en la movado: en diversaj landoj post sukcesa informado pri Esperanto la publikaj instancoj permesas la instruadon de Esperanto aŭ petas Esperanto-kurson, sed neniu aŭ tro malmultaj homoj volas lertiĝi kaj akiri diplomon pri instruado... Estas ia mensa malsano... Fakte ni esperas, ke ni havos kandidatojn eĉ en atendolisto. Ni devus lertigi 200 personojn jare.

* Prezidanto de ILEI



La ĉina ekonomio

Aldreno Speko

En la okcidentaj amaskomunikiloj, oni ofte (fakte insiste) parolas pri la profundaj problemoj de la ĉina ekonomio: granda ŝuldo kiu nuntempe superas je 200% la malnetan enlandan produkton (MEP), “fantomaj urboj” (kun milionoj da vakaj apartamentoj), artefarita kurza valoro (la juano daŭre malkostas por faciligi eksporton) ktp.

Tio estas la tradicia rakonto en okcidentaj gazetoj dum la lastaj 10-15 jaroj: “La ĉina ekonomio ne povas kreski je 10% dum tridek jaroj; tio ne eblas; tio estas veziko kiu baldaŭ krevos; la ĉina ekonomio subite ĉesos kreski kaj tio starigos seriozan krizon tra la tuta mondo”.

Fakte, ekde la “Azia Krizo” en 1997, oni atendas la disfalon de Ĉinio. Tamen la kolapso ne venas kaj ĝi estas daŭre (kaj eble ĉiam estos) prokrastata por estonta dato.

Malgraŭ ĉiuj problemoj, la ĉina ekonomio antaŭeniras. Laŭ la fonto de la usona registaro mem, *CIA World Factbook* - Monda Faktlibro de CIA (usona informkolekta gvatagentejo), ĝi jam superis tiun de Usono en 2014 laŭ la AA (Aĉetopova Alparo). MEP estas ekonomia kalkulo bazita ne sur rekta kurza kalkulo, sed sur la “aĉeta kapablo” de la nacia mono

ene de sia propra ekonomio. Ekzemplo: nuntempe unu usona dolaro valoras ĉirkaŭ 6,50 juanojn (ĉina valuto). Evidente, la usona dolaro pli valoras ol la ĉina juano, sed la juanan kurzon kondiĉigas tio ke plejmultaj varoj en Ĉinio estas ankaŭ pli malmultekostaj ol la samaj varoj en Usono. Oni povas aĉeti pli da varoj en Ĉinio ol en Usono per la sama kvanto da mono.

Antaŭ kelke da jaroj la brita gazeto *The Economist* moke kreis la indicon *Big Mac* por pli facile klarigi, kion signifas MEP. *The Economist* uzis ĝin, ĉar *Big Mac* estas preparata laŭ la sama maniero – per la samaj ingrediencoj – ĉie en la mondo. La lokaj partneroj de *McDonalds* ne rajtas ŝanĝi la recepton de la sandviĉoj kaj estas devigitaj (laŭ kontrakto) ĉiam fari ilin laŭ la samaj precizaj manieroj kaj kun la samaj grandoj kaj kvalito. Pro tio, *Big Mac* estas bona mezurilo por kompari la relativecon de la prezoj el diversaj landoj.

Ekde la komenco de la tiel nomata “Politiko de Malferma Pordo”, sub la iniciato de Deng Xiaoping, en 1978, la plej grava zorgo de la ĉina registaro kaj de la Ĉina Komunista Partio estis (kaj ankoraŭ estas) solidigi la socian stabilecon per plena laborigo de sia loĝantaro. Nu, plena laboreco okazas nur se la ekonomio daŭre kaj forte kreskas, almenaŭ je 5%

jare. Laborantaj (kaj sataj) homoj ĝenerale ne ribelas.

De 1979 al 2010, la ĉina ekonomio kreskis averaĝe je 10% jare (6,7% en 2016, dum Usono kreskis je 1,5%).

Se la ciferoj falus sub 4%, la ĉinaj gvidantoj riskus (kaj timus) politikan kaj socian tumulton pro la vasta nombro da senlaboruloj. Tio da senlaboraj homoj, sen salajro kaj sen vivrimedo, estus danĝera situacio por la ŝtato. La popolo fariĝus malkontenta kaj komencus dubi la kompetentecon de la komunistoj kiel regantoj de Ĉinio. Malkontenteco jam okazis diversfoje laŭlonge de la ĉina historio. Multfoje kamparanoj ribelis kaj faligis imperiestrojn kaj potencajn lokajn mandarenojn (antikvajn ŝtatoficistojn). Do, ekonomia stabileco de la socio estas la ĉefa zorgo de la ĉina registaro kaj de la Ĉina Komunista Partio.

Kutime la dinastioj (Han, Tang, Ming) falis post iom longa kaj serioza krizo pro klimataj ŝanĝiĝoj kaj naturaj katastrofoj (sekeco, inundoj, malvarmo, tertremoj), malsato aŭ minacoj el la ekstera mondo (invado, milito).

La ĉinaj gvidantoj posedas bonan scion pri la historio de sia lando kaj kutime planas por longa tempo – almenaŭ 30 jaroj. En Okcidento, pro la oftaj balotoj, la politikistoj zorgas nur pri sia 4-jara mandato. Jen amuza rakonto pri la



ĉina pacienco (kaj longplanemo): kiam la mongoloj konkeris Ĉinion en la 13-a jarcento, iu demandis al mandareno, kion la ĉinoj devus fari. La mandareno respondis trankvile: “Ne gravas, la mongoloj estas paŝtistoj; ili neniam restas longan tempon en la sama loko. Post 100 jaroj ili foriros”.

Pro multaj lecionoj de la historio, la senhalta kresko ne povas ĉesi. La implica kontrakto inter la popolo kaj la partio estas, ke la partio ebligas ekonomian kreskon kaj senĉesan plibonigon de la

vivkondiĉoj kaj, interŝanĝe, la ĉina popolo akceptas la regadon de komunistoj kaj ne postulas politikan liberecon aŭ demokration.

Dum kiom da tempo tia interkonsento daŭros, tio dependas de la stabileco kaj sano de la ĉina ekonomio en la venontaj jaroj. La mondo esperas, ke ĉinaj gvidantoj lerte mastrumos la ekonomion kaj kondutos saĝe en la politiko, precipe rilate internacian politikon, ĉar la destino de Ĉinio influas ĉiujn landojn en la nuntempa epoko de tutmondiĝo.

Esperanto, daŭripova evoluo kaj EU

Ĉi tiu artikolo estas rezulto de kompilo el diversaj fontoj. Mi ĉefe laboras pri la temo “Esperanto kaj daŭripovo”, ĉar, laŭ mi, ankaŭ Esperanto estas kulturo kaj kulturo ne pravigas natur-detruon. Se la legantoj de *Heroldo* deziras ricevi la bazan bibliografion rilate ĉi tiun artikolon, bonvolu kontakti min - w.guenther.esperanto@web.de.

Wolfgang Guenther

1. DAŪRIPOVA EVOLUO

La tri gvidprincipoj de UN estas paco, homaj rajtoj kaj daŭripova evoluo. Ili estas senalternativaj kaj neintertrakteblaj.

Daŭripova evoluo en social-ekologia senco signifas, por individuoj kaj kolektivoj, zorgemon pri la resursoj, stabiligon de la sistemo “ekosfero” kaj socialan justecon por ĉiuj. La koncepto estas spactempa: ĝi validas ĉiuloke sur nia komuna limigita planedo por la nuna samkiel por la futuraj generacioj. Tion diras gravaj dokumentoj de UN.

Aktuale esencaj ideoj de daŭripova evoluo estas reduktado (kapvortoj: limvaloroj, “Malpli estas pli!”, postkreska ekonomio), kompensado (por neevitebla konsumo kaj ties nedaŭripova karaktero, ekzemple per forforstado) kaj adaptiĝado (kapvortoj: resilienco, t.e. adaptiĝado al ŝanĝitaj bazaj kondiĉoj per plifortigo de la rezistopovo kaj la utiligo de lernokapabloj, ĝenerala prevento, estigo de protektofaktoroj laŭ la demandoj “kion eviti?”, “kion konservi?”, “kion ŝanĝi?”.

2. KULTURO KAJ DAŪRIPOVO

Kulturo determinas per siaj valoroj kaj agadmodeloj la interrilatojn de individuoj, kolektivoj, nacioj ktp, samkiel la interrilatojn inter homo kaj vivmedio. Pro tio la nuntempaj krizoj de sociala justeco (kapvortoj: riĉa/malriĉa, militoj, migrado) kaj de la minacata vivmedio (kapvortoj: klimatoŝanĝiĝo, speciopereco) estas homfaritaj kaj entute rezulto de krizo de la homa kulturo.

La interrilataro de kulturo (homosfero) kaj naturo (biosfero), de kiu la homo estas ja (nur) parto (kaj partnero), karakterizitas per du celpriskriboj:

1. Kiel ni atingas, de la detrua globaliga kulturo orientita al merkato (t.e. al kapitalo kaj profito), social-ekologian kulturon de daŭripovo?

2. Kiel ni formas kulturon mem social-ekologie daŭripovan? (Kapvortoj: “Nenia kulturo pravigas la detruon de la naturo!”).

Postulata estas la kunpensado de kulturo kaj naturo.

3. KOMUNIKADO KAJ DAŪRIPOVO

Komunikado estas esenca parto de kulturo. Ĝi konsumas grandajn kvantojn da resursoj (metalojn, rarajn terojn, energiojn).

Ekzemple interreto konsumas pli ol la tutmonda flugtrafiko, kun altiĝanta tendenco. Simile al transporto kaj veturila trafiko, ankaŭ ĝi devas submetiĝi al la postuloj de daŭripovo pri reduktado, kompensado kaj adaptiĝado. Ankaŭ en ĉi tiu kampo de homa agado “ĉiam pli” estas ekologie dubinda.

4. LINGVOJ KAJ DAŪRIPOVO

Kaj biologia kaj kultura/lingva diversecoj estas partoj de social-ekologia daŭripovo, ĉar ili decide kundeterminas la nunajn kaj futurajn eblojn kaj opciojn en la naturaj kaj kulturaj sistemoj, aparte rilate al eblaj adaptiĝoj. Pro tio la koncepto de lingvodiverseco en EU estas ĝusta.

La uzurpado de la nocio “daŭripovo” flanke de la lingvo kaj de la turisma industrio tamen certe ja celas denove merkaton kaj konsumon. La “terglobaj kriterioj por daŭripova turismo” de la “tergloba daŭripova turisma konsilantaro” sekve do parolas nur pri minimumigo de la efikoj de turismo sur la surlokaj loĝantaro, kulturaj heredaĵoj, vivmedio kaj resursoj. Almenaŭ estas postulata klimatonetraleco.

Lingvo signifas potencon pro tio, ke ĝi estas rimedo de manipulado. En la jaro 2011 ATTAC (<https://www.attac.org>) bone klarigis, ke la angla en la hodiaŭa politika kaj ekonomia sistemo fariĝis instrumento de la potenculoj, kiu bezonas demokratian kontrolon.

5. LINGVOJ KAJ EU

La lingvopolitiko de EU baziĝas sur la ideo “unueco en diverseco”. Artikolo 2 de la Ĉarto de la Eŭropaj Fundamentaj Rajtoj tekstas: “La Unio respektas la diversecon de la kulturoj, religioj kaj lingvoj”. La 26-a de septembro estas la Eŭropa Tago de Lingvoj. El ĉi tiu vidpunkto postulas dumviva (lingvo)lernado. Fono de ĉi tiu pensmodelo estas la eŭropa tradicio pri “unueco de teritorio kaj lingvo”.

Komuna lingvo ne estas planata en Eŭropo.

La oficiala “doktrino” estas, ke ĉiu civitano de EU lernu/parolu minimume tri lingvojn: sian gepatran, unu el la “pli grandaj” (angla, franca, germana, hispana) kaj unu de komunlima alilingva nacio.

Ĉiu civitano povas kontakti EU kaj rajtas je respondo en sia gepatra lingvo. La

lingvoservoj de EU kostas al la unuopa EU-civitano ĉiujare po 3 eŭrojn.

Laŭ la fakta praktiko, la lingvouzo en EU (kun 23 lingvoj kaj pli ol 500 tradukdirektoj) “ordigatas” kadre de “Regularo de Oficialaj Lingvoj” (oficiala statusplano) kaj de “Regularo de Laborlingvoj” (neoficiala statusplano), kiu estas absolute dominata de la angla, kvankam laŭnombre la plejmulto de la EU-civitanoj estas germanoj (ĉ. 16%) kaj nun post la EU-eksiĝo (t.n. Brexit, Briteliro) de la Unuiĝinta Reĝlando la nombro de la denaskaj parolantoj de la angla decide malkreskis.

Komunikado kaj lingvopolitiko ne estas ankriĝitaj en la “EU-Strategio pri Daŭripovo”.

En EU, lingvopolitiko (ankoraŭ) ne estas ekkonata kaj valorigata kiel social-ekologia komponanto.

6. ESPERANTO: DIFINO

Esperanto estas planlingvo aŭ “artefarita” lingvo (en la senco, laŭ kiu aŭtomobilo estas artefarita ĉevalo “inventita, sed funkcia”).

Ĝi funkcias kiel dua lingvo por ĉiuj, laŭ la moto: “Ĉiu parolu minimume 2 lingvojn, sian gepatran kaj Esperanton”. Origine tiu neŭtrala internacia lingvo estis ligata al la “interna ideo” pri paco kaj homaj rajtoj.

Sub la impreso/premo, ke la homaro evidente ja bone kapablas, ankaŭ en stato de paco kaj je (plejparta) observado de la homaj rajtoj, detruis sian komunan hejmlandon, okazis nova refleksado kaj valorigo de Esperanto, kiu pliampleksigas Esperanton per social-ekologia dimensio.

La aktuala

difino de Esperanto tekstas do:

Esperanto estas la lingva parto de neŭtrala social-ekologie daŭripova internacia kaj transkultura komunikado.

7. ESPERANTO KAJ DAŪRIPOVO

Male al ĉiuj etnaj lingvoj, la enkonduko kaj aplikado de Esperanto (kadre de EU kaj aliloke/aliorganizaje) realigas per si mem tri konkretajn social-ekologie daŭripovajn ce-

lojn en la kampo de internacia kaj transkultura komunikado. Tiuj estas:

1. Integra lingveco, t.e. la celo de transkultura spaco, en kiu lingvo ne apartigas, sed integras/kunigas (paco!);

2. Demokratia dulingveco, t.e. la celo de lingva egaleco/justeco; neniu havas malavantaĝon pro sia etna lingvo (homaj rajtoj!);

3. Ekologia konformeco, t.e. la celo de minimumigo de resursodisipado (materialoj, energio) kaj de vivmedidamaĝado (daŭripova evoluo!). Ĉi ĉio certe ja validus por ĉiu alia planlingvo.

8. ESPERANTO KAJ EU

Esperanto, laŭ la oficialaj/laŭleĝaj premisoj de EU, aktuale ne havas bonŝancon fariĝi aldona lingvo de EU (surbaze de libervoleco), ĉar ĝi nek estas oficiala lingvo de iu EU-membroŝtato, nek iu membroŝtato petus pri ĝia enkonduko, nek ĉiuj membroŝtatoj unuanime aprobus tion. Tio certe ja ankaŭ validas post la EU-eksiĝo de la Unuiĝinta Reĝlando.

Restas espero pri leĝoŝanĝado de EU, eble pro simpla pliprudentiĝo/konsideremo aŭ sub “premo de katastrofo”.

Ĉiuokaze oni devas deveni de la fakto, ke ĝis nun la social-ekologie daŭripova karaktero de planlingvo kiel Esperanto ankoraŭ ne atingis la plimulton en EU. Ankaŭ la oficialaj Esperanto-organizaĵoj ĝis nun nur tre heziteme alproksimiĝas al ĉi tiu esenca valoro de sia propra projekto. Ĉiuokaze EU per la integrado de Esperanto grave malproksimiĝus de la bildo esti intertempe ankaŭ nur iom tro grandiginta pakto por globaligo.



Heroldo viglas kaj survojas al sukcesa 2018

Spite al la grandaj malfacilaĵoj de *Heroldo* de Esperanto dum sia unua fazo en Brazilo, pro la ricevo de falsa listo de abonantoj, venis reago de nulo post multe da strebado. Nun ni prezentas al niaj legantoj la lastan numeron de la jarkolekto 2017.

Vera listo devus enhavi ĉirkaŭ 600 aktuale abonantojn, preskaŭ ĉiujn en Eŭropo. Tiu fifaro de LF-koop malebligis al Fabrício Valle enspezi ĉirkaŭ € 35.400 kaj akurate eldoni *Heroldo-n*, plenumi sian devon kvitiĝi kun LF-koop) kaj tuj formi profesionan redakcia stabon.

LA BONAJ NOVAĴOJ

Nu, *Heroldo* per ĉi-numero (la 2273-a de ĝia tuta vivo) kompletigas sian jarkolekton 2017, kun nur ses numeroj. Tio ne ŝanĝos la situacion de la abonantoj, ĉar *Heroldo-n* oni povas abonati iam ajn tra la jaro, kaj tiuj, kiuj abonis dekdu numerojn, ricevos ĉiujn ilin.

La sekva numero estos la 1-a de la jarkolekto 2018 kaj ni kaptas la okazon por prezenti al niaj legantoj la novaĵojn kaj gravajn informojn:

■ **Niaj 4-paĝaj kajeroj:** *Spegulo* fariĝos dumonata kaj aperos en la paraj monatoj. Alterne aperos nova kajero, nome *E-Lernoĉambro*, por komencantoj kaj komencintoj, kiu aperos en la neparaj monatoj.

■ **Niaj rubrikoj:** Sciencia *Heroldo* kaj Lingvio fariĝos dumonataj, devos ĉiam okupi tutan paĝon kaj aperos alterne en la neparaj kaj paraj monatoj.

■ **Redakcia stabo:** la redakcia stabo de *Heroldo* konsistas nuntempe el kvar homoj: Fabrício Valle (redakcia direktoro, Brazilo), Bruĉjo Kasini (vic-redakcia direktoro, Italio), Andrej Peĉenkin (redakcia sekretario, Rusio) kaj Roberto Pigro (ĉefproblekto, Italio/Kipro). En 2018 *Heroldo*

devos aldoni al sia redakcia stabo kunredaktorojn kaj ĉefredaktoron.

■ **Konstantaj kunlaborantoj:** la nombro de konstantaj kunlaborantoj kreskas. Se paroli pri nur tiuj, kiuj akceptis la inviton aliĝi (senpage) al la programo *Wrike* (uzata de *Heroldo* por mastrumado de la preĝo de ĉiu sia numero), jam enlistiĝas 15 konstantaj kunlaborantoj, inkluzive de la rubrikistoj (Renato Corsetti, Xavi Alcalde kaj César Dorneles).

■ **Programoj uzataj:** *Heroldo* uzas du programojn: *Wrike* (mastrumado de projektoj) kaj *Pipedrive* (rilatoj kun abonantoj kaj potencialaj klientoj. Ĉi tiu programo estos ekuzata fakte la 1-an de februaro 2018).

■ **En Eŭropo:** Preskaŭ 3-monata laborvojaĝo de Fabrício Valle tra Eŭropo de la komenco de junio al la fino de aŭgusto 2018, kun la ĉefa celo paroli pri *Heroldo*-aferoj

kaj prezenti al la eŭropa *HdE*-abonantaro la fondotan Instituton Teo Jung, kiu heredos *Heroldo-n*.

DIGNOPLENA TENIĜO DE LF-KOOP ESTAS ATENDATA

La nuna posedanto de *Heroldo* pretas rezigni pri siaj rajtoj pri aktuala abonlisto kaj daŭre proponas al LF-koop refaron de la kontrakto laŭ veraj bazoj. Se ĝis la somero en Eŭropo LF-koop plu rifuzos refari la kontrakton, Fabrício Valle pretas viziti la gvidantojn de LF-koop en Svisio, por persone pritrakti la aferon, ĉar LF-koop estis la unua kiu rompis la kontrakton kaj ne povas simple decidi repreni *Heroldo-n*, kiu estas kaj estos plu eldonata en Brazilo.

Do estas pluraj motivoj por tuj abonati *Heroldo-n* ĉe www.heroldodeesperanto.com.

Nova NRO venos en la mondon por agado per Esperanto

Inter marto kaj majo 2018 Esperantujo estos naskiĝejo de nova internacia neregistara organizaĵo, kiu adoptos Esperanton kiel laborlingvon por sia agado en internacia skalo.

Se interesas vin agado per Esperanto sur unu el la plej diversaj kampoj de la tria sektoro (NRO-j), Sociala Lingvo sin prezentos kiel ŝlosilan mondan organizaĵon uzantan Esperanton por tre konkrete roli en la evoluigo de la praktika uzo de Esperanto. Vi povos agadi ĝuste en via preferata laborkampo!



CELARO



Roli kiel inkubatoro (kovejo) de ĉefmotoraj kaj lokmotoraj NRO-j ĉie tra la mondo. Tiuj NRO-j laboros harmonie en horizontala nivelo



Organizi internacian reton de komunumaj lingvo-lernejoj, kie Esperanto rolos kiel propedeŭtika lingvo



Organizi kaj funkciigi reton de ĉiuj ĉefmotoraj kaj lokmotoraj NRO-j, en sistemo bazita sur internacia interorganiza mutualismo

KIAJN MEMBROJN NI SERĈAS EKDE NUN?

Sociala Lingvo jam havas bazan grupon laborantan por ĝia fondo en Brazilo (sidejo de la nova NRO Sociala Lingvo), sed nun venas la horo internaciigi ĝian fondo-grupon, per enplekto de Esperantaj socialaj aktivuloj el la tuta mondo. Tiajn homojn ni serĉas:

- pretajn aktivi sur sia preferata kampo: lingvo-instruado, edukado, kulturo, scienco, solidara ekonomio, homaj rajtoj, arto, homa solidareco, sociala asistado ktp;
- pretajn agadi konkrete ĉu kadre de Sociala Lingvo, ĉu kiel kunkreantoj de ĉefmotora aŭ lokmotora NRO en sia urbo.

Atentu

Oni ne devos pagi aliĝkotizon por fariĝi membro de Sociala Lingvo, nek jare, nek monate, sed aliflanke ne interesas nin pasivaj membroj. Sociala Lingvo estos NRO de aktive agantaj membroj. Malmultaj ni estos, sed ni volas konkrete fari multon. Simpatiantoj povos poste fariĝi subtenantoj.

Kontaktu nin tuj kaj prezentu viajn demandojn/dubojn. Eksciu kiel vi povos partopreni ĉi tiun grupon kiu volas kunlabori pri la ŝanĝo de la mondo per Esperanto.

<http://bit.ly/partopreno-socialalingvo>

Sociala Lingvo Per Esperanto ŝanĝi la mondon



LA ESPERANTA MUZIKO TRANS LA LIMOJ DE ESPERANTUJO

“ Dirindas, ke niaj ĉeestoj en esperantistaj eventoj tre malmultegis! Ni prezentas nin ĉefe ekster la limoj de Esperantujo, sed ni atendas invitojn al E-eventoj. Atentu pri ni, esperantistoj” – **Rafael Milhomem**

“ Pli kaj pli la nombro da simpatiantoj pri nia laboro kreskas kaj la reago de la Esperanta publiko estas tre interesa. Mi opinias, ke ja per la arto oni plej bone povos diskonigi Esperanton, kaj tiuj, kiujn interesas tio, trovas en nia laboro riĉan materialon por ŝatantoj de roko” – **Muniz**

p. 3

Kio estas artverko?

Heroldo ekde nun ofte reaperigos artikolojn de la korifeoj de nia literaturo, jam forpasintaj. La celo estas kaj stimuli la grandajn talentojn de la nuntempa Esperantujo verki por *Heroldo* kaj prezenti al novbakitaj esperantistoj niajn plej grandajn nomojn de la pasinteco. Ĉi-foje jen eseo de William Auld. Inspiriĝu! **p. 2**

Tatyana Auderskaya

Vipas politikistoj per fajfa skurĝ',
Kontraŭ volo mi krias kun ĉies kri'.
Stop! Mi plu ne obeos. Ektremu, burĝ'!
Via rolo finiĝis en Histori'. **p. 3**

Kunlaboru kun *Spegulo*

La HdE-kajero de arto kaj kulturo bezonas altnivelajn kunlaborantojn. Proponu vin kiel konstantan volontulan verkanton aŭ tradukanton ĉe <http://bit.ly/Spegulo-kunlaborantoj>

ESEO

Kio estas artverko?

William Auld*

Se, laŭ mi, nek emocio, nek belo, nek eĉ scio estas la kriterio kaj celo de tio, kion ni nomas artkreado, kaj de tio, kion ni nomas artverko, en kio, do, ili konsistas?

Tute mallongan respondon ni kompreneble ne povas doni. Evidente la demandoj estas tro komplikaj por lakonaj respondoj. Sed kiel elirpunkton ni povas preni la kreaĵprocezon mem. Mi opinias, ke la artisto sin esprimas, kaj ke la publiko deziras scii tion, kion li esprimas. Kaj verkisto-artisto esprimas – kaj povas esprimi – nur tion, kio en li estas. Tio, kio en li estas, inkluzivas, kompreneble, liajn ideologiojn, konceptaron, antaŭjuĝojn, opiniojn, spriton aŭ mankon de sprito, emociojn, sentumojn – unuvorte ĉion, en kio konsistas la personeco, kiu estas ĝuste tiu artisto, tiu homo, unika kaj senzozia. Esprimo de la personeco de la artisto – jen kio estas artverko. Kaj ĝuste tial ne gravas multe la temo, pri kiu li verkas, ĉar la temo estas nur hoko, sur kiun li pendigas sian personecon. La treege talenta usona verkisto de detektivromanoj, Raymond Chandler, skribis:

“Mi ne scias, kio estas la plej alta nivelo de literatura atingo: same nek Eŝilo nek Ŝekspiro tion sciis ... Se ĉio alia estas egala, kio ĝi neniam estas, pli potenca temo elvokos pli potencajn rezultojn. Tamen oni verkis kelkfoje tre enuigajn librojn pri Dio, kaj iujn tre bonajn pri kiel perlabori sian panon kaj resti pli-malpli honesta. Ĉiam estas decida la aŭtoro de la libro, kaj kio en li troviĝis por ĝin verki.”

De la intereso kaj profundo de la artisto personeco dependas la intereso, profundo – kaj sekve la sukceso – de la verko. Jes, sed ekzistas miloj, eĉ milionoj da interesaj kaj profundaj personecoj, kiuj tamen ne kreas, nek sentas bezonon krei artverkojn. Kompreneble! Ĉar la kreado de artverkoj postulas ankaŭ da aliajn necesajn antaŭkondiĉojn: la deziron de la artisto sin esprimi – kaj sin esprimi ĝuste laŭ la vojoj de la artoj, kaj ne laŭ tiuj de la sporto, aŭ la profesia laboro, aŭ la politiko – kaj lian regadon super la iloj kaj rimedoj de la koncerna arto. Kaj ĝuste tiu lasta kondiĉo, kiun unuavide oni tro facile preteratentas, faras kaj difinas la diferencon inter sukcesa kaj malsukcesa, grava kaj malgrava, artverkoj.

Do, laŭ mi, la tri gravaj ingrediencoj de artverko estas: la personeco de la artisto, lia impulso sin esprimi, kaj lia regado super la fizikaj esprimiloj de lia arto.

Unue, la personeco de la artisto. Tio ĉi, pli ol ekzemple la trivialeco de la temo, klarigas la fakton, ke ni distingas inter verkoj, kiuj estas artverkoj, kaj verkoj, kiuj ne estas artverkoj. La limo de la du regionoj eble ne estas tute klare markita, sed ĝenerale ni faras netan distingon inter romano poparte aperanta en virina semajngazeto (kio ne estas “literaturo”), kaj romano, kiu eniras la sanktejon de la t.n. “klasikaĵoj”; inter la pentraĵo “Venuso” de Botticelli kaj pentraĵo

farita por apudŝosea reklamtabulego. Inter varietea muzikaĵo kaj la simfonioj de Beethoven. Rakonto fariĝas literaturo, nur se ĝi perdas sian neŭtralecon, sian mezecon, sian ordinarcon, kaj se traŭdiĝas unika voĉo de individua, frapanta personeco. Same ĉe bildo aŭ komponaĵo. Ĉar antaŭ ĉio artverko devas esti unika, kaj unikaj estas, ne la temoj, sed la individuaj personecoj. Kaj inter verkistoj, trivialaj homoj verkas trivialaĵojn, kaj profundaj, unikaj homoj verkas artaĵojn. Kaj, por ke la artverko plaĉu al ni, necesas, ke la personeco de la artisto – kiom ni ekkonas ĝin pere de lia verko – estu al ni simpatia. Al multaj homoj, iom surprize, tute mankas ĉia tia simpatio kun alies personeco, kaj tial ili restas efektive surdaj kaj blindaj antaŭ la artverkoj, kvankam kelkfoje ili ne scias tion, ĉar ili reagis meĥanike laŭ la postuloj de sia edukigo aŭ de ia snobismo.

Due, la impulso de la artisto sin esprimi. Ĉiuj homoj, pli aŭ malpli forte, spertas impulson sin esprimi, iel sentigi sin al siaj homfratoj – kaj tial, ekzemple, ne mankas partoprenantoj por la plej stultaj televidaj ludoj, ĉar dum kelka tempo oni estas rigardata de milionoj da aliaj personoj. Aliaj tiras atenton al si per sia granda modestecco kaj sinretiriĝemo. Sed la verkisto-artisto esprimas sin pere de siaj verkoj. Kaj ĝenerale ŝajnas, ke ia artisto verkas por iu publiko, kvankam mi ne scias, ĉu tio estas absolute valida, aŭ ne. Sed kompreneble, se oni uzas rimedon de komunikigo, la lingvon, por verki poemon, ŝajnas nature, ke oni celas leganton. Iuj diras, ke la leganto povas esti nur la verkinto mem. Mi ne estas certa pri tio. Sed mi opinias, ke se oni verkas por publiko, oni tamen preferu, ke la verkon trovu la publiko kaj ne la verko celu la publikon; ĉar la artisto devas sin esprimi aŭtentike, sen tro multa atento al la deziroj kaj kriterioj de aliaj personoj; alie minacas risko, ke la verko efikas false kaj falos el la regiono de la arto en la regionon de la trivialeco.

Kaj de kie fontas tiu impulso sin esprimi? Mi citu la opinion de Marjorie Boulton, kun kiu mi emas konsenti, ke “la poezia kaj la seksa emoj ŝajne rilatas nedistingeblaj”, ke “arto estas surogata seksa agado”. Al multaj neartistoj tiu opinio povas ŝajni iom ekstrema, iom troigita. Tamen, ĉu vi iam pripensis, kiom el tio, kion ni nomas bela, devenas de la “natura” neceso sin vivteni kaj sin reprodukti? Se ni pensas pri la koloroj de la floroj, la plumaro de la birdoj, la kolharoj de la leono, la haŭtornamaĵoj de la cervo kaj aliaj bestoj, ni konstatas, ke tiuj belaĵoj ekzistas aŭ pro la natura neceso allogi parulon, aŭ pro la neceso timigi sian malamikon aŭ sin kaŝi de la malamikoj. Estas efektive tre malfacile trovi “naturajn” belaĵojn, kiu ne fontas el unu el tiuj bazaj naturaj necesoj: sin vivteni kaj sin reprodukti. Kaj iuj psikologoj asertas, ke ankaŭ ĉe belaĵoj, kiuj unuavide ne fontas tiel, regas ia seksa simbolismo. Angla pentristo diris, ke la plej bela formo estas la cifero 8 – kaj oni facile konstata la seksan simbolismon de tiu prefero!

Triale, sed plej grave, ni atingas la regadon de la artisto super la fizikaj esprimiloj de sia arto: de la pentristo super la farboj, jes, sed ankaŭ super la formoj, de la komponisto super la sonoj, kaj de la poeto super la vortoj. Ĉar inter la koncepto de la artisto, kaj la farita artverko, ĉiam staras la lukto kontraŭ la fizikaj limoj de la esprimo – inter kies limoj oni klopodas esprimi ŝajne senliman koncepton. Pro postuloj de la spaco, mi ilustras tion ĉefe en kunligo kun unu arto – la arto poezia. Evidente la esprimo de la poezio estas la vortoj. Iu franca poeto foje diris “la poezion oni faras ne per ideoj, sed per vortoj”, kaj li pravis. Vortoj estas la simboloj, per kiuj la homoj komunikas unu al la alia. Ĉiu homo scias manipuli ian stokon da vortoj iele-iome, duone malbone, kaj la postuloj de la ĉiutaga vivo estas sufiĉe rutinaj kaj senkomplikaj, por ke ne necesu ia tre konscia, subtila aŭ profunda manipulado de tiuj simboloj; kaj ĉar ĉiu homo ja scias legi, ĉu ne, do ĉiu homo devus tuj kaj senĝene kompreni ĉiun skribaĵon pri kio ajn? Tio estas absurda. Kiel la gitaro same taŭgas por popola kanzono kaj por Bach'a studaĵo ludata de la majstro Segovia, tiel ankaŭ la lingvo same taŭgas por najbarin-babilado kaj por la “Dia Komedio” de Dante. Sed inter la du prezentoj kuŝas larĝa profundegaĵo. Kaj, same kiel iu individuo povas esti surda por la muzikaĵoj, tiel ankaŭ iu individuo povas esti surda por la vortoj: li povas aŭdi la sonojn, sed la subtilaĵojn li ne kaptas, kaj la specialan plezuron de subtila nuancita lingvaĵo li ne ĝuas. Kaj tiam li plendas, ke la poeto verkas nekomprenblaĵojn! Sed, same kiel homo povas sin eduki por progrese ĝui – se ne “kompreni” – la muzikaĵojn, tiel li povas sin eduki por progrese kompreni la poezion. Sed ankaŭ li devas, kiel la artisto pli frue, lerni la subtilaĵojn de la lingvaĵo, kaj por tion fari li devas nepre senti, ke la atingo valorigas la penon. Se tiu sento mankas, li neniam ricevos stimolon por fari al si la penon. Mi memoras, ke antaŭ multaj jaroj, kiam la unuan fojon venis en miajn manojn poemaro de la usona poeto Ezra Pound, mi “komprenis” tre malmulte el lia poezio. Kaj tamen mi sentis la stimolon de lia lingvaĵo, kaj tiu stimulo donis al mi impeton por febre studadi liajn verkojn, kaj post kelka tempo mi trovis, ke mi “komprenas” lian poezion, kaj ke la kompreno bele kompensas la tamen grandan penon kaj studadon, kiujn mi dediĉis al tiu tasko. Sed multaj homoj konfuzite haltas antaŭ la unua baro – fakte, la lingva baro – kaj plendas, ke la poeto mistifikas ilin. Kaj ili rajtas resti mistifikitaj, sed ili perdas pli profundan sperton kaj pli profundan vivoĝuon. Neniun arton oni vere komprenas senpene. Kaj tio validas por ĉiuj artoj. Kaj se oni ne volas fari al si la klopodon eltrovi la ŝlosilojn de kompreno, oni ne rajtas kulpigi pri tio la artiston, kiu jam delonge preterpasis la elementan stadion de la novica ricevanto de la verko.

Mencio de Ezra Pound donas al mi okazon illustri la specialajn teĥnikojn de la

poeto per unu el liaj mallongaj poemoj. Efektive tre mallonga estas tiu poemo, ĉar ĝi konsistas el titolo plus kvar vortoj. Kaj tamen! Jen ĝi. Ĝi nomiĝas (kaj notu bone la titolon):

PAPIRUSO

Kaj jen la poemo:

Printempo...

Tro longe...

Góngula...

(Tiu lasta vorto estas tiel same “nekomprenbla” en la originalo.)

Por mi estas tute nekredible, ke multaj legantoj, kiam tiu poemeto unue aperis, simple ĝin ne komprenis, ĉar ĝi ŝajnis al mi je unua ekkono kristale klara. Oni scias, ke en elfositaj rubejoj de antikvaj urbetoj oni trovis fragmentojn de iamaj papirusaj skribaĵoj (pri tio eĉ ekzistas originala verko en Esperanto!). Kelkfoje tiujn fragmentojn oni sukcesis kunmeti por ricevi kompletaĵon, kelkfoje ne. Nia poeto supozas tian fragmenton de antikva papiruso, sur kiu restas nur tiuj kvar vortoj. Kaj li, kiel ankaŭ ni, scivolos pri la origino de tiu fragmento. Ĉu knabino skribis al sia forestanta amanto? Ĉu maljuna patrino al sia malproksima filo? Oni ne plu scias, kaj ĝuste ĉar oni ne plu scias, tiuj kvar etaj vortoj vekas en ni amason da hipotezoj, scivoloj kaj eblecoj. (La vorto “Góngula” povus ekzemple esti propra nomo; ĝi devenas de greka vorto, kiu signifas “ĉarma” proksimume, sed ne necesas, ke ni sciu tion; la fremdeco mem de tiu belsona silabaro povas nur aldoni al nia plezuro, se, kiel la infanoj, ni kapablas ĝui la sonon de vortoj senkonsidere pri ilia signifo.) Laŭ mia opinio, tiu poemeto perfekte ilustras la kapablon de la vortoj sugesti al ni multe pli ol la nuda sumo de ilia supra signifo, kio estas unu el la ĉefaj trajtoj de la poezio speciale, kaj de la artverkoj entute.

Kaj, fine, kio pri la rilatoj inter la artisto kaj la publiko? Ĉu la artisto iel respondecas antaŭ la publiko? Mi opinias, ke ne. Mi opinias, ke tiu problemo estas relative simpla. Mallonge, la artisto faras verkon. Se li proponas ĝin al la publiko sub formo de aĉetebla varo, la publiko rajtas ĝin akcepti aŭ malakcepti laŭplaĉe, kaj tie finiĝas la afero. Se la publiko atakas aŭ eventuale adoras iun artiston, nu, tion oni povus antaŭsupozi, ĝuste ĉar la artisto havas sian vidpunkton, kiel aliaj publikaj homoj – politikistoj, sanktuloj kaj reformuloj – havas sian vidpunkton, kiun aliaj homoj atakas aŭ adoras, aŭ priindiferentas.

Unue aperis en la *Nica Literatura Revuo* 7/1 (n-ro 37), paĝoj 8-13

William Auld forpasis en septembro 2006

Barok-Projekto serĉas novajn horizontojn por metalroko kaj por Esperanto

El la redakcio

Kreita en 2005, nur lastatempe Barok-Projekto plene surscenejiĝis, sur la Esperanta kaj ne-Esperanta medioj. Cetere, profunde impresas kiom ofte kaj pozitive la brazila metalroka E-bando estis temo de reportaĵoj en fakaj blogoj kaj gazetoj pritraktantaj la mondon de la punka, hardkora kaj alternativa muzikoj en Brazilo. Tio montras, ke definitive Esperanto transsaltas la limojn de la tradiciaj kulturaj manifestiĝoj kaj enplektiĝas en la junularan muzikmedion. Tio okazas danke al ne nur idealismaj kaj muzikemaj gejunuloj, sed ankaŭ al la persista agado de Vinilkosmo.

Se paroli pri Vinilkosmo, en ĝia retejo oni povas legi, ke “En 2015 la grupo subskribis kontrakton kun la muzikeldonejo Vinilkosmo, lanĉante en la fino de la sama jaro la unuan oficialan disketon *Jen nia Viv-river*”, taksitan kiel la unuan oficialan albumon de peza metalo en Esperantujo.”

De faritaĵo al farotaĵo, la planoj de la brazila bando estas ja ambiciaj. Ĉiuj bandanoj, nome Junior Nieri (drumo), Karlíene Araújo (voĉo), Rafael Muniz (akustika kaj elektra gitaroj, klavaro kaj kromvoĉoj), Rafael Milhomem (elektra gitaro, bekfluto, blovklavaro, klavaro, kavakinjo kaj perkutiloj) kaj Thiago Alberto (basgitaro), unusente celas fari el Barok-Projekto profesion bandon, ĉar ĉiuj jam estas profesiuloj ligitaj al muziko.

Ili jam pruvis, ke ilia laboro altnivelas, kaj la esperantista publiko agnoskis tion, elektinte la albumon *Sovaĝa Animo* (2016) kiel la “Muziko-n de la Jaro”, laŭ konkurso de la revuo *Kontakto*.

Jam pli frue, en 2013, la kanzonoj *Jen Nia Viv-River* kaj *La Plej Bona Ĉasisto* estis tre alte taksitaj en la 1-a Muzika Konkurso de la revuo *Kontakto*. Barok’ ricevis la duan lokon flanke de la ĵurio pro la kanto *La Plej Bona Ĉasisto*.



KIAL KANTI EN ESPERANTO

Heroldo demandis al Rafael Milhomem kial Barok-Projekto decidis kanti en Esperanto, kaj li klarigis tion per la jenaj vortoj: “Kiam mi havis la ideon krei metalrokan bandon, mi invitis mian amikon Muniz, kiu senhezite akceptis partopreni. La procedo por elekti la laborlingvon de la bando estis kurioza afero. Miakcepte, la kanzonoj bezonus sonorecon diferencigitan, ĉar tiam mi tute ne kapablus asimili la ideon, ke taŭgus kanti metalrokon en la portugala kaj, se ni kantas en la angla, tio povus sonori ordinare.

Do mi havis la ‘brilan’ ideon kanti en la latina lingvo! Sed tiu ideo estis post kelkaj tagoj rifuzita, ĉar la latina gramatiko estas tre malfacila, kun multe da deklinacioj, kaj mi sciis preskaŭ nenion en tiu lingvo. Krom ĉio, temis pri morta lingvo. Iom poste venis la ideo, ja tre freneza, kanti en la

portugala, sed inverse, de la fino al la komenco de la vortoj. Post testo tiu ĉi opcio estis forĵetita.

La traserĉado de la perfekta lingvo daŭris plu kaj iam oni informis min pri kurso de Esperanto, sub la gvido de Valdemir Moreira. Nu, ĝis tiu momento, mi neniam antaŭe estis aŭdinta ion ajn pri tiu lingvo. Nu, mi faris la kurson kaj ekentuziasmiĝis pri ĝia sonoreco.

Post tre malmulte da tempo, mi jam regis Esperanton sufiĉe kaj komencis komponi novajn kanzonojn por ke nia bando kantu ilin en Esperanto.”

Rafael informas, ke, kvankam ĉiuj kanzonoj estas kantataj en Esperanto, kaj eĉ la informoj de la albumo estas en Esperanto, okaze de la prezentoj de Barok-Projekto foje estas kantataj ankaŭ kanzonoj en la angla, de bandoj kiel Rhapsody, Metallica, Blind Guardian ktp.

RECENZO

Metalroko, baroko kaj indiĝena mitologio

Flávio Fonseca

www.brazilakolekto.blogspot.com

Alvenis al miaj manoj la KD *Sovaĝa Animo*, de BaRok-Projekto, kiun mi estis komisiita recenzii. Mi devas aserti, ke mi estis agrable kaj pozitive surprizita!

La muzika mikso estas kapturana. Temas laŭdifine pri metalroko, tamen la sono enhavas elementojn de klasika muziko kaj pli specife, kiel sugestas la bandonomo, de barokaj gutoj. Do la distorditaj elektraj gitaroj kaj la intensa drumado kunvivas kun bekfluto kaj sintezila klavaceno. Sed la unua kaj forte impresa surpizo estas la malferma muzikaĵo de albumo, kies ĉefa instrumento estas brazila kavakinjo!

Krome, la temo de la muziktekstoj moviĝas en la indiĝena universo, malkaŝante la mitologion de la originaj praloĝantoj de Sud-Ameriko. Oni tiel aŭdas pri Jasi’, Gūarasi’, Abasai’, Akūanduna, Kaapora kaj multaj aliaj, ĉio traktata kun ĝusta kaj laŭdinda respekto.

Sed ne tie ĉesas la kuraĝo: la tuta disko estas kantita en Esperanto! Jes, tio estas nepre atentiginda informo, ĉar evidente temas ne pri grupo da idealistoj kiuj decidis muziki, sed pri profesinivela grupo, kiu elektis la Internacian Lingvon por sonigi interese sian muzikon. Kaj tio kun elstara detalo: ili estas veraj esperantistoj, ne papagoj.

La bandanoj estas (laŭ alfabeto ordo): Junior Nieri (drumo), Karlíene Araújo (voĉo), Rafael Muniz (akustika kaj elektra gitaroj, klavaro kaj kromvoĉoj), Rafael Milhomem (elektra gitaro, bekfluto, blovklavaro, klavaro,



kavakinjo kaj perkutiloj) kaj Thiago Alberto (basgitaro). Krome, la albumo gastigas plurajn specialajn invititojn, ekzemple kantistojn, klavariston, solgitariston, kaj eĉ Rikardo Cash, kiu misteretose parolas dum la unuaj sonoj de la albumo.

La disko estas tre bone ludita kaj tre bone studie registrita. La mikso havas bonan ekvilibron – kvankam en kelkaj partoj la voĉo ŝajnas iom mallaŭta, sed eble tio kongruas kun la metalroka stilo. La komponaĵoj (far Milhomem kaj Rafael Muniz) kaj la muzikaranĝoj estas riĉaj, atentokaptaj.

Cash estas ankaŭ la teksta reviziinto, kio plicertigas la lingvan nivelon. Ankaŭ la prononco estas ĝenerale bona. Ofte aperas melismoj (silabo kantata sur pli ol unu muziknoto), kio estas sufiĉe akceptebla. Tamen iom ĝenas, ĉefe la puristojn, la nemeto de du silaboj en unu solan muziknoton (“nia” sonanta kiel “nja”, ekzemple). Komprenible, tio alproksimigas la tekston al la parolata lingvo, kaj estas konsiderata de iuj kiel licenco, sed temas pri kutimo ne ĝenerale akceptata, kaj povas iel generi konfuzon.

La kovrilo elstarigas. La tuta grafika arto estas altkvalita, kun belegaj bildoj ilustrantaj la temaron. Aparta plezuro estas aŭskulti la muzikon akompanate de la tekstokajero kaj admirante la bildajn detalojn.

Eĉ se vi ne ŝatas aŭ ne kutimas aŭskulti metalrokon, tiu albumo meritas vian atenton, ĉar ĝi minimume estas valora registro de grava mitologia esploro, kiu sendube riĉigas la esperantan kulturon. Kaj se vi estas metalumema... simple ĝuu!

Kantoj de malgranda homo el malgranda Eŭropo, 21-a jc.

Tatyana Auderskaya

¹
Mi estas malgranda homo el malgranda Eŭropo.
Mi loĝas en malgranda, tamen ja propra domo,
Havas mi malgrandan salajron kaj familion grandan,
Kaj pro tiuj kialoj mi bone scipovas kalkuli:
Kiom kostas studado en la Universitato,
Kiom kostas manĝado, kiom – privata lernejo,
Kiom da mono restis sur mia konto en banko
Post la aĉeto de nova, tre bezonata aŭto;
Mi ja ne povas veturi al oficejo mia
Per tiu malnoviĝinta, pasintjara modelo:
Mi perdos mian prestiĝon, oni al mi ne konfidos
Kaj ne plialtigos salajron, tiam el kio mi pagos
Krediton pro nova modelo de luksa polvosuĉilo?

Mi estas malgranda homo el malgranda Eŭropo,
Mi havas malgrandajn zorgojn en mia malgranda mondo.
Sed kiam fremdaj misiloj al nia lim’ proksimiĝis,
Fariĝis glacie malvarma mia komforta hejmo
Kaj ne plu protektas muroj kontraŭ neŭtrona morto,
Kaj miaj malgrandaj zorgoj fariĝis unu grandega,
Unu grandega, komuna por ĉiuj loĝantoj de l’ Tero:
Konservi nian planedon vivanta kaj verdoblua,
Konvena por ĉies vivo, por ia ajn vivo sur la Tero.
Ne estos plu rusoj, francoj, nigruloj aŭ usonanoj –
Restos nur unu homaro, racia gento sur la Tero,
Krono de la kreaĵo, ne ĝia pereiginto.

²
Nin informas gazetoj:
Hodiaŭ pereis tiom da,
Murditaj, pafitaj – tiom da,
Pendumigitaj – tiom da!
Kion ankoraŭ vi volas?
Sufiĉe, haltu, jam bolas
La Tero pro sang-inundo
Kaj skuas sin ĝis profundo:
Anstataŭ la lando – vundo
Sur la vizaĝ’ de la Tero,
Anstataŭ prospero –
Mizero,

Kaj glata ŝtata malvero;
Jen gloras denove poetoj
La heroojn militan
Kun nobla celo furitan:
Honestan kaj senprofitan
Apogon al ŝtatoj etaj,
Tamen eksplodi pretaj
Kun tuta nia planedo,
De l’ Homo freneza predo.
Mi timas, mi krias pro timo,
Ne volas mi esti viktimo;
Sed malgraŭ preĝoj kaj petoj
Plukreskas ruĝa makulo
De la tutplaneda brulo,

Ĝi estas jam en proksimo.
Nin savos neniu saĝulo,
Nin savos nur kontraŭstaro
Persista al la registaro.
Se strebas ĝi al milito,
Se por ĝi milito –
Profito,
Do nia respondo – nur spito.
Vivaj – ni volas vivi!
Mortu – milita morto!
Estu – hom-inda sorto!

³
Baldaŭ mi foriros el tiu kaĝ’,
La ĉagren’ inundas en mia sin’.
La mond’ ne havas almenaŭ guton da saĝ’;
Mi ne ŝatas kaj ne agnoskas ĝin.

La patrino rakontis pri blua land’,
Kie sonas kantoj de birda hor’...
Kiel reprezentant’ de l’ danĝera band’
Estos mi mortpafita post unu hor’.

Vivi – estas sukcesi unua al gorĝ’
Enkroĉiĝi kaj poste sin savi per fuĝ’.
Vivi estas mensogi. Perfidi. Forges’
Kaj obe’ al pli fortaj – jen estas la leg’.

Vipas politikistoj per fajfa skurĝ’,
Kontraŭ volo mi krias kun ĉies kri’.
Stop! Mi plu ne obeos. Ektremu, burĝ’!
Via rolo finiĝis en Histori’.

Ni mortigis garantiulojn. En plena aviadil’
Ni eksplodis bombojn, vengante al mond’ de sinistr’.
Estis de ni forrabita la ĉefministri’
Kaj prezident’ pafita en propra aŭtomobil’.


Ĝuis ni potencon super la pita ar’,
Igis nin fortaj kaj bravaj ilia tim’.
Kiam subite trafis nin policikomisar’,
Por moment’ mi embarasiĝis – kaj restis la sola viktim’.

Jes, mi estas malforta. L’ potencoj potencos plu.
En maljusta mondo ankoraŭ unu maljust’.
Jam neniam min malsekigos la pluv’,
Eble nur sango el kelkaj truetoj en brust’.

Mi malkredis la mondon. La mondo mensogis min;
Entute – remio. Estus mi je deknau en juni’.
Nur mi volas, ke al neniu pli la patrin’
Rakontu pri blua mondo, damnita, neebila por ni.

Fabrício Valle tra Eŭropo por *Heroldo* kaj Sociala Lingvo

Fabrício Valle, brazila esperantisto kaj redakcia direktoro de *Heroldo*, planas labor-ekskursi tra parto de Eŭropo inter la 8-a de junio kaj la 28-a de aŭgusto, sed nur per kunlaborado de lokaj grupoj el la principe celataj landoj*. Li povos tiel konkretigi sian mision por *Heroldo de Esperanto* kaj por la internacia neregistara organizo Sociala Lingvo.



CELO DE LA VOJAĜO

Diskonigi diversajn aspektojn pri la funkciado de la nova *Heroldo de Esperanto* kaj diskuti ĝian estonton; prezenti la internacian neregistaran organizaĵon Sociala Lingvo, kiu estos fondita inter marto kaj majo 2018 en Brazilo.

STRATEGIO

Italio estos lia bazo kaj de tie li plenumos sian laboron en kvar etapoj laŭ regionoj, ĉiam revenante en Italion post la fino de ĉiu etapo. La partopreno en ĉiuj grandaj eventoj de tiu periodo, inkluzive de la UK kaj de la Itala Kongreso de Esperanto, estas grava parto de la strategio.

KUNLABORO NECESA

Estos necesa sufiĉe frua enplektiĝo de lokaj grupoj por organizi kunsidojn. Fabrício Valle proponas plurajn elekteblajn prelegojn. Helpo por la gastado kaj eventuala eta financa kompenso pro la prelegoj estos bonvenaj.

PAGAJ KURSOJ

En urboj kun pli bone strukturita loka movado eblos organizi 12-horan enkondukan kurson de Esperanto por komencantoj kontraŭ aliĝkotiĝo. La diskonigado de la kurso okazos per interreto, per speciala retpaĝo en la loka lingvo kaj per lokaj rimedoj. Parto de la enspezo apartenos al la loka organizanto.

ITINERO

La itinero devas esti zorge kaj detale planata. Pro tio gravas tre fruaj kontaktoj inter Fabrício Valle kaj la potencialaj kunlaborantoj.

AGU

Agu tuj kaj diskutu en via grupo la proponon de Fabrício Valle. Li ŝategos koni vian grupon kaj interŝanĝi ideojn, prelegi, amikumi kaj Heroldumi. Lia retadreso estas redakciadirektoro@heroldodeesperanto.com

* Italio, Svislando, Francio, Britio, Germanio, Hispanio (kaj Katalunio klopodanta sendependiĝi), Portugalio, Nederlando, Belgio, Aŭstrio, Pollando, Hungario, Ĉeĥio kaj Slovakio